

EL POPOLA ĈINIO



Jul. 1953

外文出版社
出版部
出版科

Kun Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Te

—Rememoroj pri mia kunestado kun kamaradoj
Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Te en la Ruĝa Armeo—

Ŝju Sung-lin

Remarkoj de la Redakcio: Dum la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito (t.e. la milito inter la jaroj 1927—1936, priparolata kun la Norden-ekspedicio de 1925—1927, kiu estas konata kiel la Unua Granda Revolucio), k-do Ŝju Sung-lin, la aŭtoro de ĉi tiu skizo, servis en la Ruĝa Armeo kiel kuriero en la Komandejo de la 4-a Ruĝa Armeo, poste, la ĉefo de kurier-grupeto, la vic-estro kaj estro de la Kuriera Pelotono en la Komandejo de la Unua Korpuso de la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝarmeo, kaj, pli poste, la estro de la Speciala Roto de la Ĉef-komandejo de la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝarmeo, k.a. Li havis la feliĉan ŝancon kunvivi, kunlabori kaj kune batali kun k-doj Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Te dum la 33 monatoj ekde januaro, 1930 ĝis septembro, 1932. Iutempe li estis en la sama parti-grupo kun ambaŭ ili. K-do Ŝju nuntempe estas la ĉefo de la Armila Sekcio de la Proviza Departemento de la Hunan-a Militregiono.

En la jaro 1930, k-do Ĉu Te estis la Ĉefo de la 4-a Ruĝa Armeo, kaj k-do Maŭ Ze-tung estis la Politika Komisararo de tiu armeo. La ruĝarmeanoj portis diversformajn kaj diverskolorajn vestaĵojn, kun ruĝa signorubando sur la maldekstra maniko. Tre malabunda estis la municio—ĉiu havis maksimume 50 kartoĉojn, kaj iuj eĉ nur havis 3-5. Unu kuglo valoris al ili kiel granda trezoro. Nur malmultaj havis kartoĉo-rubandojn, ĝenerale oni portis siajn kartoĉojn en sakoj aŭ poŝoj. La pafiloj estis malbonaj, plejparte produktajo de Fukien-provinco. Multaj nove aliĝintaj batalantoj ne havis pafilojn, kaj tial ili portis lancojn aŭ grandajn ferajn forkojn ornamitajn per ruĝaj kvasoj, aspektante tre heroaj. Anstataŭ ŝuoj, plejparto de la batalantoj portis sandalojn, kaj ŝtrumpoj estis maloftaj.

Sub la rekta, persona gvido de k-doj Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Te, ni ĉiam elmontris eksterordinaran heroecon kaj sinoferemon en batalado. Tuj ricevinte la ordonon de atako, ĉiu batalanto, kvazaŭ feroca tigro, sin jetis al la malamikoj, kiuj baldaŭ ekstermiĝis en la daŭro de kelkaj horoj. Ĉiufoje kiam ni atingis kantonmenton por tranokti, k-do Maŭ Ze-tung, kiu tiam estis tre malgrasa, kunsidis kaj pridiskutis kune kun k-do Ĉu Te kaj la Ĉefstabano pri la problemoj de batalo kaj militiro. Li ofte propramane skribis ordonojn ĉe tablo, sur seĝo, aŭ, se ne troviĝis tiaj, sur ŝtono. En lia ĉambro pendis milita mapo (sur kiu estis alpinglitaj flagetoj ruĝaj kaj blankaj). Ĉiunokte li paŝadis tien kaj reen en la ĉambro, pensante pri la militprojekto, kaj kelkiam kune kun k-do Ĉu Te. Li neniam enlitiĝis, se la projektoj ne estis bone elpensitaj kaj la laboro ne ĝuste aranĝita.

Se alvenis ĵurnaloj el ekster la "revolucia baz-regiono", li ilin atente tralegis, kaj kelkiam eĉ du- aŭ tri-foje, dum tuta nokto nedormante por finlegi ilin. La pli gravajn materialojn li detranĉis per tondilo. Dum militirado, rajdante sur ĉevalo, li sin okupis aŭ je la pripensado de militprojektoj, aŭ je legado aŭ, pro nesufiĉo de dormo dum la nokto, fermis siajn okulojn por iom sin refreŝigi. Antaŭ ĉiu batalo, li kaj k-do Ĉu,

Te elpensis planon, kaj post detala pristudo kaj konsidero, kunvokis la militestrojn, por kune diskuti kaj fari decidon. Dank' al la perfekteco de iliaj planoj, ni ĉiam venkis la malamikojn. Se la situacio iel malfavoris, ili tuj ordonis foriron, por trovi pli favoran ŝancon kaj strategie pli bonan pozicion por plua ofensivo. La malamikoj jam lernis sufiĉe el la sangaj spertoj en kontakto kun ni, tial ili ofte haltis 2-3 kilometrojn antaŭ ni kaj ne kuraĝis marŝi pli proksimen.

En majo de 1931, kiam la dua kontraŭ-sieĝa kampanjo komenciĝis, la Ĉefkomandejo militire alvenis Ĉjaŭtoŭkoŭ, en Dunggu-gubernio, Kiangsi-provinco. K-doj Maŭ kaj Ĉu ripozis en iu apudvoja dometo, kiu konsistis el nur 2-3 ĉambroj. Apenaŭ kvin minutojn post nia alveno, venis iu popolano kiu raportis ke la malamikoj troviĝas je la distanco de 1-2 kilometroj, kaj ke baldaŭ ili venos. Mi kune kun la aliaj kurieroj iris antaŭen por rekognoskado. K-do Ĉu sekvis nin. Kiam ni iris apenaŭ duonan kilometron, ni renkontis brigadon da malamikoj, tamen ĉe ni estis nur 50-kelkaj pafiloj kiuj estis asignitaj protekti la Ĉefkomandejon dum la retiro. "Ne gravas," diris k-do Ĉu, kun aplombo, "la malamikoj ne povas iri tiel rapide kiel ni." Tiel dirante, li kaj k-do Maŭ laŭ malsamaj vojoj surgrimpis grandan monton kaj fortiriĝis kun la trupo. Mi ne povis ilin trovi ĝis la nokto.

En tiu kontraŭ-sieĝa kampanjo, la malamikoj nombrigiĝis je 200,000 dum ni estis nur 20 aŭ 30 mil. K-do Maŭ ĉiam taktike koncentrigis nian forton por atako al la dise lokitaj malamikoj. Iufoje en 3 sinsekvaj tagoj ni gajnis 3 batalojn, kaj kaptis pli ol dek mil malamikajn pafilojn. Poste la malamiko, informiĝinte, ke nia ĉefa forto situas en la lim-regiono de la gubernioj Ningdu, Ŝingĝo kaj Jungfeng (ĉiuj en Kiangsi-provinco), mobilizis kaj koncentrigis sian tutan forton en areon kun diametro de ĉ. 7 kilometroj, por nin sieĝi. Sed, gvidate de k-doj Maŭ kaj Ĉu, ni ŝtele transkuris la sieĝon dum la nokto per nekomparebla rapideco, utiligante iun breĉon en la malamika linio, kiu larĝis ĉ. du kaj duonan kilometrojn. La sekvantan tagon kiam



PREZIDANTO MAŮ ZE-TUNG


la malamikoj alproksimiĝis, ili trovis neniun el la ruĝarmeanoj.

Dum tiu ĉi kontraŭ-sieĝa kampanjo, dum la dekelkaj tagoj de la 16-a ĝis la fino de majo, 1931, k-doj Maŭ kaj Ĉu tre malmulte dormis, ĉiam streĉe cerbumante pri militprojektoj dumnokte. Estis somero, kaj en Kiangsi svarmis moskitoj kaj kuloj, kies piko estis netolerebla Ĉiuj kadroj de la Ruĝa Armeo, inkluzive de k-doj Maŭ kaj Ĉu, ne havis litvalojn, kaj eĉ ne ventumilon. Por iom plibonigi la situacion, ili ĉiunokte bruligis branon kun herboj, por forpeli la plagon per la fumo, kiu ĉiam plenigis la ĉambron kiel densa nebulo. Se tamen la moskitoj ne cedis kaj obstine mordis, ili devis frapi ilin per ŝvit-tuko aŭ per palmfolio disŝirita por la celo. Tre ofte ili vekigis el dormo pro la feroka pikado kaj tiam oni ne povis pli bone fari ol ellitiĝi kaj promenadi en la ĉambro. Tia malagrablaĵo en la nokto daŭris kvar longajn monatojn ekde majo ĝis aŭgusto.

En frosta vetero, ili tutkorpe tremis pro la malvarmo, kiun ilia maldika vestaĵo certe ne povis forigi, kaj ili ofte sin varmigis per fajro de lignaĵo, kiun ili propramane kolektis ĉe la kantonmento. Kelkfoje, laborinte ĝis profunda nokto kaj ne povinte plu toleri la malvarmegon, ili iris al la kuirejo, prenis pecojn da fajrligno kaj ilin bruligis por sin varmigi. Ne malofte pluvus dum militiro, kaj tiam ili devis surporti la tramalsekigitajn vestojn.

En la tria kontraŭ-sieĝa kampanjo en julio de 1931, la malamikoj nombriĝis ankoraŭ pli multe, tial la situacio estis pli kompleksa kaj nia laboro fariĝis pli streĉa. Ni militiris en la nokto kaj sinkaĝis en la tago. La malamikaj aeroplanoj flugadis tien kaj reen, bombardante kaj pafante al iu ajn objekto kiun ili trovis. K-do Maŭ Ze-tung, samkiel ĉiuj aliaj batalantoj, kamufliis sian kapon per arbofolioj. Atinginte arbaron, li faris antaŭ ĉio planon aŭ aranĝon pri batalo kaj militiro, aŭ kunvokis kunvenon de kadroj. Li kuŝiĝis kaj ekripozis nur post kiam ĉio estis bone plenumita. Kompreneble li kuŝis nur sur la tero, kelkfoje kun iom da seka pajlo aŭ arbofolio sub si, uzante ŝtonon kiel kapkusenon. La sama estis kun k-do Ĉu Te.

K-do Maŭ Ze-tung havis nur unu vatitan litkovrilon, kiu estis tre maldika kaj malnova; kiam li dormis en la nokto pajlo estis uzata kiel kapkuseno, kaj se ne troviĝis pajlo, li uzis brikon aŭ ŝtonon. Li havis nur du kompletojn da vestaĵo, sur kiu estis multaj flikaĵoj. La kamaradoj volis fari al li novajn vestojn, sed li rifuzis. Li partoprenis en la sama, simpla, malfacila vivo kun la batalantoj.



Armekuniĝo de K-do Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Te sur Ĝinggang-monto, en 1928.

Olepentraĵo de Ŝang Ŝi-ĝuo

En la tri sinsekvaj kontraŭ-sieĝaj kampanjoj la vivo estis ĉiam malfacila. La kamaradoj en la Ĉefkomandejo devis manĝi maldelikatan rizon. Nur kiam bona ŝanco prezentis sin, ni povis aĉeti legomojn aŭ alian akcesoran manĝaĵon; se ne estis tia bona ŝanco, ni faligis bambuidon, metrojn altan, sekve tre maljunan, por kuiri kiel akcesoran manĝaĵon. Kelkfoje ni devis manĝi sovaĝajn legomojn, aŭ simple prepari akcesoran manĝaĵon el rizfaruno. Kaj kelkfoje, ni nur manĝis rizon kune kun bolita akvo. K-do Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Te manĝis tion saman, kion la aliaj manĝis. K-do Maŭ kutime ne volis manĝi ion en frua mateno kaj ĉiufoje antaŭ la ekiro en mateno, lia kuriero, Ĉen Ĉang-feng, kunportis iom da rizo kaj iom da legomoj en trinkvazo, por ke k-do Maŭ povu manĝi survoje dum la ripozo post marŝo de kelkaj kilometroj. Sed kelkfoje, kiam li ankoraŭ ne finis manĝi, la trupo devis denove ekiri, kaj tiam li povis nur prokrasti la manĝon ĉis la sekvonta ripoztempo. Tamen dum tempo de kampado, li manĝis samtempe kun la aliaj. Li manĝis tre malmulte, ĉiufoje nur du malgrandajn pelvetojn da rizo.

K-do Maŭ ĉiam kunportis ĉe si grandan mapon. Aŭdinte ke rekognoskanto revenis, li tuj elprenis la mapon, kaj studis, analizis kaj prijuĝis la malamikan situacion kune kun k-do Ĉu Te, por fari senprokrastan aranĝon. En ĉiu el la tri kontraŭ-sieĝaj kampanjoj ne ekzistis por ni postfronto. Ĉiun grandan batalon persone direktis k-do Maŭ kaj Ĉu mem. Ili ĝenerale restis 1-2 kilometrojn fore de la fajrlinio, direktante la batalon, dum k-do Peng De-hŭaj kaj Lin Bjaŭ k. a. komandis la trupojn ĉe la fajrlinio. La kadroj ĉe la fajrlinio senĉese alsendis depeŝojn raportante pri la situacio, kaj k-do Maŭ ankaŭ propramane skribis leterojn kiuj pere de kurieroj estis senditaj al la fajrlinio por gvidi la batalon. Kelkfoje kugloj atingis proksime apude, kaj ili devis tuj ekkuŝiĝi por sin kaŝi

Kiam la trupoj forlasis la batalpozicion farante ŝturman antaŭenpuŝon, ili surgrimpis la pozicion por observi.

La Ruĝa Armeo estis ne nur bataltrupoj, sed ankaŭ labortrupe mobilizante kaj helpante la popolamasojn fari agraran reformon kaj aliajn. En ĉiu batalo la popoloj venis amase por porti brankardojn, transporti municion kaj manĝaĵojn, eskorti kaptitojn, ktp.—ĉio ĉi demonstris la harmonian solidarecon inter la armeo kaj la popolo. Ĉie, kie la Ĉefkomandejo alvenis, granda kunveno de popolamasoj estis okazigita. La kamparanoj, aŭdinte la paroladon de k-do Maŭ, ofte emociiĝis ĝis larmoj. K-do Maŭ kaj Ĉu ĉiam havis eksterordinaran zorgemon pri la vivstato de la batalantoj kaj la popoloj. Dum kelka tempo mi mem estis en la sama parti-grupo kun k-do Maŭ kaj Ĉu. En ĉiu grup-kunveno ili nepre pridemandis pri la interrilato de la armeanoj kaj la popoloj. Se iu kamarado faris ian eraron, ili donis seriozan, sed ĝustan, kritikon. Se troviĝis ĉe ni la malfacilo aŭ problemoj, ili pacience pristudis kaj solvis ĝin por ni. K-do Ĉu Te havis nigran mulon. Dum militirado, se estis iu—kadro, batalanto, aŭ servisto—kiu ne povis plue iri pro laco aŭ malsano, li cedis al li sian mulon. Kaj se tiu rifuzis, tiam li pacience faris klarigojn kaj persistis ke li rajdu, krome konsilante ke li bone singardu por ne defali. Iufoje pro manko de legomoj ĉe la manĝo, iuj kamaradoj grumblis kaj plendis pri la netaŭgeco de la mastrumantoj. K-do Ĉu intervenis: “La mastrumantoj ja estas aferoplenaj la tutan tagon. Se ili ne sukcesis provizi nin per legomoj, tio ja estas nenio. La malfacila vivo, kiun ni nun spertas, estas kaŭzita al ni de la reakciuloj. Sed ni ĉiuj estas kamaradoj por la sama afero de revolucio. Ni estu solidaraj, fratecaj kaj interkomprenemaj.”

Dum nia kunestado, k-do Ĉu Te ĉiam pacience instruis min, instigante min lerni legon kaj skribon, kaj konsilante ke mi ĉiam atentu pri la labormaniero. Li diris: “Ne lerninte legon kaj skribon, oni ne scipovas kompreni la ordonon aŭ instrukcion, do kiamaniere oni povus plenumi la taskon al li asignitan? Se vi trovos vorton nekonatan, demandu iun ajn el la stabanoj, aŭ min.” “Via parolado ĉe la nomo-vokado devas esti celtrafa, ne pli longa ol duonhoru. La kamaradoj ja estas tre laciaj pro la irado, tro longa parolado ne oportunas.” Aliokaze li diris: “La membro de la Partio devas agi modele inter la amaso. Li neniam izolu sin for de la amaso, ĉu en laboro, ĉu en batalo, ĉu en militirado. Ĉion ajn farante, li nepre uzu sian cerbon, por ke la tasko povu esti bone plenumita. Se iufoje li eraras, la sekvontan fojon li jam scios kiel eviti la saman eraron.”

K-do Ĉu estis ĉiam tre atenta kaj zorgema pri sia laboro. Ĉiufoje atinginte la kantonmenton, li nepre detale demandis pri la gardstarigo, pri la sidlokoj de la dependaj oficejoj de la Ĉefkomandejo, kaj la distancoj inter ili kaj la Ĉefkomandejo, ktp. Kun nove trovita gvidisto li nepre faris personan interparoladon. Unue li demandis al li pri la ekonomia stato de lia familio: kiom da tero li kulturas? ĉu ĝi apartenas al li mem aŭ al aliaj? ĉu la rikoltaĵo sufiĉas por manĝi? ktp. Krome, li demandis: kien kondukas tiu kaj ĉi tiu vojo? kiom fortaj estas la armitaj fortoj de la bienuloj en tiu ĉi regiono? ktp. Li ĉesis demandi nur ĝis li bone informiĝis pri ĉiuj cirkonstancoj. Kaj atinginte la kantonmenton, li pendigis ĉiufoje sian mapon, kaj, alpinglante la ruĝajn kaj blankajn flagetojn, ĝin rigardadis foje kaj refoje.

K-do Ĉu Te havis ardan amon al gimnastiko. Kian ajn sporton oni ludis—ĉu korbopilkon, ĉu volejbalon, ĉu pinponon, li certe partoprenis. Se troviĝis proksime de la kampadejo iu lernejo, (kie ordinare troviĝis sportplaco), li ĉiam iris por sin ekzerci sur reko aŭ paraleloj, aŭ salti per-bastone almenaŭ 4-5 fojojn. Dank' al tia amo al gimnastiko, li estis tre sana kaj forta. Li leviĝis ĉiutage pli frue ol iu ajn alia, kaj estis ĉiam spiritplena kaj gaja. Li ankaŭ ŝatis ŝakludon. Kadroj, batalantoj, kuiristoj, aŭ ĉevalistoj—ĉiuj trovis ĝojon en la ŝakludo kun k-do Ĉu. Li estis tre sperta en tiu ĉi distro, havanta klaran antaŭvidon pri la disvolvo de la situacio. Sed kiam li vidis, ke lia rivalo baldaŭ malvenkiĝos, li ofte intence faris fuŝmovon kaj ŝanĝis la situacion, ke ankaŭ la kunludanto bone distriĝu.

Kiom ajn malfavora kaj malfacila estis la situacio, k-do Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Te ĉiam troviĝis en tia konstanta esperplena spiritstato. K-do Maŭ ofte diris: “La revolucio sendube triumfos en la tuta lando.” Kaj nun ni jam ĉiuj propraokule vidis, ke lia diro tute pravas.

Kurantaj Aferoj

Fondiĝis Tutlanda Budaisto-Asocio

Post 5-taga konferenco en la fame konata Ĝuangĝi-Templo en Pekino, budaistoj en la tuta lando jam fondis sian landan organizon.

La konferencon ĉeestis delegitoj de diversaj ĉinaj nacioj—hanoj, tibetanoj, mongoloj, tasi-oj, sari-ujvuroj k.a.—inkluzive de 121 budaistaj eminentuloj.

La antikvaj monaĥejoj en Lhasa, Ŝigaze (en Tibeto), en Ĉinghaj-provinco, Kansu-provinco kaj Interna Mongolio—ĉiuj estas reprezentataj. Bonzoj, monaĥoj kaj monaĥinoj venis al la konferenco kiel reprezentantoj el la sanktaj temploj en la Monto Omeĵ en Seĉuan-provinco, la Monto Utaj en Ŝansi-provinco, kaj la Monto Ĝjoŭhŭa en Anhuej-provinco. Krome, estis ankaŭ budaistaj laikoj el multaj partoj de la lando.

La Dalaj-lamao, Panĉen Ngoerteni, Ŝju Jun kaj Ĉagankogen elektigis honoraj prezidantoj de la Asocio. Ĵian Jing estis elektita kiel prezidanto, kaj ankaŭ aliaj 8 eminentaj budaistoj estis elektitaj kiel vicprezidantoj.

Unuigo de la tutlandaj budaistoj por subteni la patrolandon kaj la mondpacon estas proklamita kiel la ĉefa celo de la Asocio.

Japanlingva Eldono de “Popola Ĉinio”

La unua numero de la japanlingva eldono de “Popola Ĉinio” eliris je la 1-a de junio. La gazeto estos publikigata ĉiumonate de la Fremdlingva Eldonejo en Pekino.

Tiu ĉi japanlingva gazeto servos por diskonigi la agadojn de la ĉina popolo en landkonstruado kaj la disvolvigon de kulturo, arto, scienco kaj edukado por pliintimigi la komprenigon kaj amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj, kiuj estas luktantaj por la komuna afero de paco.

La unua numero havas 48 paĝojn inkluzive de 9 bildpaĝoj.

Reveno al la Sino de la Patrolando

Huang Gu-ljoŭ

Nelonge post kiam la aŭtokolono preterpasis Ĉonju, jam estis tagiĝo, kaj la nokte-flugantaj Usonaj aeroplanoj ne plu povis doni ĝenon. En la matena ĉielo aperis niaj facil-movaj "arĝentaj hirundoj" kiuj glitbobene flugis tra la blankaj nuboj super la aŭtokolono, postlasante blankajn fum-rubandojn kvazaŭ ili volus diri al la pasaĝeroj sur la aŭtomobiloj kaj la pacaj koreaj loĝantoj sube: Trankvile daŭrigu vian vojaĝon aŭ laboron ĉar via sekureco ja estas defendata de ni en la ĉielo.

Fluge rapidis norden la kolono kiu konsistis el dudek ok aŭtomobiloj portantaj ducent kvardek kvar pasaĝerojn ekscitajn kaj emociplenajn—la repatriigitaj vunditoj kaj malsanuloj de la Ĉinaj Volontuloj. Sonora kantado antaŭeniris kune kun la aŭtomobilaro, kvazaŭ la kantantoj volus aŭdigi sian voĉon al niaj en la alta ĉielo flugantaj "arĝentaj hirundoj".

"Kamarado, kiel granda ŝanĝo! Pli ol du jarojn pasiginte en la militkaptitejoj sur Jeju-insulo, kiu povis imagi tiel grandan ŝanĝon! Ni ankoraŭ pensis ke la ĉielo estas kiel antaŭe monopoligita de la Usonaj diablidoj. Rigardu, kiel aplombe flugas niaj "hirundoj", skadronon post skadrono. Nia bela tago finfine alvenis post tiom da turmentoj!" La parolanto estis junulo ĉirkaŭ dudekdu-jara. Li sidis sur sia vojaĝ-pakaĵo, kun unu mano sur la apogilo sur la veturilo. Li estis en alta spirito, rave rigardante al la ĉielo per duonfermitaj okuloj.

"Ne facile!" signifoplene kaj penseme diris Subpelotonestro Ĝang, kiu sidis dekstre de la junulo. Estas nediveneble ĉu li volis diri per tio, ke estis ne facile por ili pasigi en sufero la du jarojn en militkaptitejoj, aŭ por iliaj kunbatalantoj lukti sur la frontoj kaj la korea ĉielo. Li eldiris nur tiun frazon kaj eksilentis.

Evidente, tio kion li pripensis estis kelkcentoble pli multe ol tio kion li eldiris.

Kiam la aŭtomobiloj trapasis Jongŝi, iu diris: "Ankoraŭ dudek kilometrojn antaŭen kaj Jalu-rivero jam estos en vido!" Aliu diris: "Ni atingos Sinujŝu en duonhoro, kaj ni certe povos transiri la riveron je la deka antaŭtagmeze." La tria rimarkis: "Forpasis du jaroj, kiel nun aspektas la Patrolando?" Kaj ankoraŭ alia diris: "Ju pli proksime al la hejmo, des pli terure batas mia koro!" La junulo puŝetis Subpelotonestron Ĝang apud si, kaj demandis: "Subpelotonestro, kial vi silentas? Ne ĝoja, ĉu?"

Ĝangĉjo respondis nur longe poste: "Ne estante lignaĵo, kiel mi povus ne ĝoji kiam mi povas reveni al la patrolando?" Paŭzinte momente, li daŭrigis: "Ŝjaŭ Deng, vi ne scias mian koron. Homo povas nur unufoje morti, ne dufoje. Nun mi estas savita, ne mortinte ĉe Koje, nek ĉe Jeju. Kiu, vi diru, nin savis el morto?" Li haltis atendante la respondon de Ŝjaŭ Deng.


"Nia Patrolando! Estas nia potenca Patrolando kiu savis nin el morto. Ĉu ne?"

"Prave! Vi tute prave diris. Mi ja pensas nun, kiel mi faros por dediĉi ĉion mian al la konstruado de nia granda Patrolando....."

Tiele ili babilis, ĉiuj esprimante siajn pensojn. Antaŭ ol ili elverŝis ĉion el sia cerbo la aŭtomobiloj ĉe la antaŭo haltis unu post la alia.

"Sinujŝu!" iu kriis.

Tuj el la difektitaj etaĝdomoj ĉe ambaŭ flankoj de la vojo elfluis amaso da koreaj avinoj, onkklinoj kaj fraŭlinoj en diverskoloraj vestaĵoj, kiuj svingante flagojn aŭ florojn en siaj manoj, fluge kuris al la haltintaj aŭtomobiloj. Ilin sekvis grupo da oficiroj kaj soldatoj de la Korea Popola Armeo. Ĉiuj laŭte kriis sloganojn kaj alkuris renkonte al siaj longe apartigitaj karuloj por manpremi kun ili. Tiu ĉi estis la lasta korea urbo en la vojaĝo. Tiu ĉi granda amaso estis reprezentantoj de la civitanoj de Sinujŝu kaj la Korea Popola Armeo, kiuj venis al la bordo de Jalu-rivero por bonvenigi kaj samtempe por diri "bonan vojaĝon" al ili antaŭ ol ili transiros la riveron. La koreaj popolanoj kantis ĉinajn kantojn, kies ĉiu vorto kaj ĉiu frazo tiel penetris la korojn de la vunditaj kaj malsanaj ĉinaj volontuloj ke ili ne sciis kiel respondi. Ĝangĉjo estis tiritra ĉe la maniko de iu



Trapasante la antaŭurban distrikton de Andung, la repatriigitaj volontuloj estas varme bonvenigataj de la popolamasoj.

La Subjugado de Jungding-rivero

Ke Ĝja-lung

De tempo nememorebla, la plej granda rivero en Norda Ĉinio, Uding, laŭvorte, "La Neniam Kvietiginta", viktimitis la loĝantaron de sia valo. Ĝi kaŭzis tiom multe da ĉagreno ke la manĉua imperiestro Ĉjen Lung (1736-1795), kiel ĉiuj siaj antaŭuloj, nekapabla ĝin kontroli, provis tion fari simple per ŝanĝo de ĝia nomo en Jungding. "La por Ĉiam Kvietiginta". Tiu ĉi imperia favoro de baptado ankaŭ malsukcesis pacigi la tumultan riveron.

Tamen en la aŭtuno de 1953, nur 4 jarojn post kiam la ĉina popolo transprenis la regpotencon en sian manon. Jungding-rivero subjugiĝos por ĉiam kiel nominale tiel ankaŭ efektive. Oni subjugos ĝin por la utilo de la popolo.

Jungding-rivero longas je pli ol 700 kilometroj, trakurante areon de pli ol 47.000 kvadrataj kilometroj, pli grandan ol Svislando. Ĝin formas Jang- kaj Sanggan-riveroj, kiuj renkontiĝis ĉe Ĉuguntun, kaj poste ĝi fluas suden kaj kuniĝas kun alia ĉefa branĉo, Ĝuejsuj-rivero.

Baldaŭ post ĉi kuniĝo, la rivero eniras ĉe Ĝuanting-vilaĝo la mallarĝan, rokan gorĝon kiun ĝi tranĉas tra la altaj, krutegaj montoj. Ĉe Sangĝadjen, ĝi fluas en Hopej-ebenejon. Ĉirkaŭfluante Pekinon dum ĝi pasas sub la Lugoŭĉjaŭ, aŭ Marko-Polo-ponto, ĝi kuniĝas kun Haj-rivero ĉe Tienzino antaŭ ol flui en Pohaj-golfon.

Fizikaj Traĵtoj de la Rivero

La pluvkvanto sur la supraj partoj de Jungding-rivero estas tre neegale dividata tra la jaro. Longtempe

avino kiu ŝovis ion en lian manon. Al Ĝangĉjo, vidi la avinon estis kvazaŭ vidi sian patronon. Larmeroj perle ruliĝis sur liaj vangoj. Lia buŝo senĉese tremis dumlonge ne povante eldiri eĉ unu vorton.

La verda Jalu-rivero alkuris al ili, la aŭtomobiloj fluge veturis trans la riveron. La pasaĝeroj sur la veturiloj vekiĝis el la arda atmosfero de bonvenigo kaj adiaŭo de la korea popolo. Kiam ili konsciis, ke la fratoj kaj fratinoj en la patrolando pli kaj pli alproksimiĝas kun ĉiu sekundo, kaj ke la patrolando, al kiu ili sopiradis jam dum nekalkuleblaj noktoj de maldormo en la Usonaj militkaptitejoj, baldaŭ aperos antaŭ iliaj okuloj, ili ne povis sindeteni de heroeca kantado. Ilia laŭta kantado flirtis super Jalu-rivero, akordiĝante kun la ritmo de la ruliĝantaj radoj de la aŭtomobiloj.

Antaŭ ol la kanto finiĝis, la aŭtokolono jam atingis Andung, la unua urbo de la patrolando kiun ili vidis post pli ol du jaroj da disiĝo. Ĉi tie aŭdiĝis la intima patria lingvo, ĉi tie vidiĝis la bonveniganta amaso de la aminda patrolando. Kun tremantaj lipoj, ridantaj vizaĝoj sur kiuj ekbrilis larmoj, la vunditaj kaj malsanaj kamaradoj ne klare perceptis kion ili vidis en la unua rigardo. Ĉiuj sentis ke la koroj rapide batadas, ke la korpa varmeko de la aliaj transpasas al ili, ke arbaro da brakoj estas svingiĝantaj al ili, ke sennombraj prizorgemaj okuloj estas rigardantaj al ili, ke floroj

la rivero estas tiel malprofunda ke ĝin oni povas facile travadi. Sed pezaj pluvŝtormoj kutime atakas en julio kaj aŭgusto. Dum tiaj inundaĵ sezonoj, la torento fluegas tra Ĝuanting-gorĝo, kie ĝi kuras malsupren laŭ kruta deklivo por 110 kilometroj. Poste ĝi sin jetas en la malferman, malalte kuŝantan ebenejon. Kun granda rapideco, la subite liberigita furioza besto ree kaj ree detruis la digojn laŭlonge de ambaŭ bordoj, inundante la kampojn kaj forkaptante la loĝantojn kune kun iliaj domoj kaj dombestoj.

Jungding-rivero estas ankaŭ granda transportisto de ŝlimo. Ĉirilate, ĝi rivalas eĉ kun la Flava Rivero, kaj pro tio ĝi estas ofte nomata la Malgranda Flava Rivero. Multe da ĉi tiu ŝlimo lasiĝas en ĝia malrapidefluantaj partoj sur Hopej-ebenejo kaj en Haj-rivero. Konsekvence, la riverujo inter la digoĵ iom post iom leviĝas ĝis ĝi nuntempe altas multe pli ol la bordaĵo. Do, ĉiufoje kiam ĝi superfluas siajn bordojn, ĝia akvo ne povas retrofluis en sian originalan fluejon, sed stagnas aŭ serĉas alian elirejon al la maro. Tio elmetis treege malfacilan problemon antaŭ la malnovaj akvokonservaj laborantoj, ĉar la altiĝado de la digoĵ ne estis senlima, sed la akumulado de ŝlimo estis konstanta, senfina.

Konstanta Minaco


La rezultato de ĉi tiu fakto estas tio ke dum la pasintaj du mil jaroj, Jungding-rivero ŝanĝis sian vojon multfoje. Ĝi estis kvazaŭ giganta serpento kun sia vosto kaptita en la gorĝo, dum sia kapo, ekster la kontrolo de homo, bategas libervole sur la ebenejo. Tial,

velkiĝantaj pro longa atendado enŝoviĝas en iliajn sinojn.... ĉio ĉi pasis kvazaŭ sonĝo, en ebriceo.

Iu maljuna virino kiu kutime sidis ĉe la vojrand transe de la Armeana Butiko riparante ŝtrumpojn por la Volontuloj, tiun tagon vidis la atendantan amason ekde la tagiĝo. Oni atendadis sen manĝado, kun sento kvazaŭ de patrino kiu atendas la revenon de sia filo ĵus liberigita el la karcero kaj ne povas manĝi sen vidi lin. Tiu maljuna virino finfine vidis ke la atendataj karuloj ja alvenas. Same kiel ĉiuj aliaj ŝi jam povis vidi la simplajn amindajn vizaĝojn. Ŝi viŝis la okulojn per la maniko kaj samtempe diris ripete: "Dankon al la ĉielo kaj la tero, jen revenas finfine!"

Tiu ĉi nekonata virino eble havas filon en Koreio, aŭ eble inter la revenintoj estas iuj kiuj portas la ŝtrumpojn de ŝi riparitajn, kiu scias? Sed la preterpasantoj sur tiu vojo scias ke ŝi estas unu el la multaj patrinoj kiuj ĉiam silente benas ilin por ilia sekureco. Tiom longe kiom paco ankoraŭ ne venkas super milito, la patrinoj ne forgesas beni ilin vekiĝinte en la nokto.

Tie ĉi, ili ekvidis iom el la sukcesoj de la konstruado de la patrolando sed samtempe ili ankaŭ vidis la detruon faritan de la Usonaj imperiistoj al la paca vivo de la patria popolo. Ili vidis la ruinigitajn kvartalojn, bombitajn de la malamikaj aeroplanoj je la deka kaj la dekunua de majo. La belaj loĝaj kvartaloj ĉe la montpiedo de Ĝengĝang estis nun sceno de rubejo, sam



Skizo pri la projekto de Güanting-akvokonservejo

Granda Muro, okupos areon de 220 kvadrataj kilometroj t. e., tri kvaronoj de la grandeco de la konteo de Londono.

495 metrojn longa defluiga tunelo estas jam elfosita sur la dekstra bordo apud la digo. Post kiam la digo estas konstruita, tiel blokante vojon al la rivero, la tunelo estas la sola regula ellasejo por Jungding-rivero flui malsupren. La rapideco de fluo estos reguligata de enfluej-turo kun kluzpordoj kiu estas starigata ĉe la enirejo de la tunelo. Akvo fluos normale tra la tunelo kun la rapideco de 24 kubmetroj po sekundo. Tian akvokvanton oni konsideras sufiĉa por irigacio kaj aliaj celoj malsupre.

Ne fore de la elirejo de la tunelo, baseno por kvietigo ricevos la akvon elkuregantan el mur-pasejo, tiel malpliigante ĝian rapidecon kaj eventualan detruan energion.

Sur la maldekstra flanko de la digo, progresas konstruado de betona dekliva elfluigejo. Sub maloftaj kondiĉoj kiam la Güanting-akvokonservejo estas preskaŭ plena rezulte de eksterordinare pezaj pluvstormoj, akvo forfluos tra la elfluigejo, kaj tiel la supro de la digo estos protektata.

La konstruado de la digo kaj ĝiaj akompanantaj instalaĵoj komenciĝis en oktobro, 1951. Antaŭ tio, intensa preparado estis farata dum du jaroj. De post tiam la antaŭe kvietita kaj soleca Güanting-vilaĝo transformiĝis en prosperan komunumon kun oficejoj, tenejoj, loĝejoj por laboristoj, elektrejo, multaj laborejoj, poŝtofiĉejo, banko, librejo, bibliotekoj, kluboj kaj kooperativoj.

Loko por Labori kaj Lerni

Dekoj da miloj da laboristoj nun okupiĝas pri la laboro sur la konstruejo. Plejmulto el ili estas junaj kampistoj el proksimaj vilaĝoj kie ili ricevis teron dum la agrara reformo. Ili volonte venis ne tial, ke ili soifis perlabori ekstran monon, kvankam ilia meza salajro sufiĉas por ĉiu el ili nutri familion de 5 homoj, sed tial, ke ili scias por kio kaj por kiu ili konstruas ĉi tiun grandan digon. Ili sciis ke, per sia propra paca, krea laboro, ili helpas alporti prosperon al la tuta lando, al si mem kaj ankaŭ al tiuj de ili amataj. Ili estas direktanta la sorton de sia propra patrio.

Tial, labor-entuziasmo estas alta. Novaj rekordoj estas konstante kreitaj kaj rompita en rapida sinsekvo. Ruĝaj flagoj estas starigitaj tie kaj ĉi tie sub la mont-

deklivo kaj en la gorĝo. Tiuj laborantaj sub ili estas membroj de modelaj teamoj eminentaj en la laborkonkurso.

Tri ok-horaj laborvicoj alternas. Laboristoj eldejojintaj amuzas sin per kantado, dancado, ludado aŭ lernado. Ili vivas riĉe varian vivon. Politikan lernadon ili ĉeestas fervore. En la teknikaj trejno-kursoj, la veteranaj laboristoj instruas la novajn, la progresintaj helpas la malpli spertajn. La tuta konstru-loko estas granda lernejo kie la kampisto-laboristoj ricevas politikan kaj teknikan edukon.

Ili kutimiĝas al la kolektivisma vivo kaj ili ege ŝatas ĝin. Kiel milionoj aliloke tra la tuta lando, ili transformiĝas en armeon da spertaj laboristoj, pretaj por fari pli grandan laboron dum la grandskala konstruado kaj industriigo de nova Ĉinio.

Sur la reto de aŭtovojoj, tiel malproksime kiel la okulo povas vidi, longa fluo da ŝarĝ-aŭtoj alportas necesajn konstru-materialojn—ligno el Interna Mongolio, cemento el Norda Ĉinio, dinamito el Orienta Ĉinio kaj maŝinoj el Nordorienta Ĉinio. Tiuj miloj da homoj laborantaj super ĉi tiu projekto scias ke centoj da milionoj da iliaj samlandanoj staras firme malantaŭ ili.

Kviete Fluas Jungding-rivero

Belega perspektivo malfermiĝas ĉiufanke de la montsuproj altstarantaj super la Güanting-akvokonservejo. Hodiaŭ, la ĉirkaŭaj montoj kaj montetoj estas ankoraŭ plejmulte senproduktaj, la valoj senarbaraj, la kampoj sekegaj kaj la disaj etaj vilaĝoj konsistas el pajlsegmentaj kabanoj kun argilaj muroj....malsupre, la malprofunda, ŝlima Jungding-rivero serpentumas tra la gorĝo.

Sed baldaŭ, vasta smeralda lago ekbrilos sub la sunbrilo. En la ne malproksima estonteco, la najbaraj montoj estos kovritaj per riĉa foliaro. Frukstarbejoj punktos la montdeklivojn. Vivo riĉiĝos; birdoj kaj malgrandaj animaloj plenigos la arbarojn; fiŝoj svarmos en la akvo. Klimataj kondiĉoj tiel pliboniĝos ke nenia postsigno de la antaŭa dezerteco restos.

La bordoj de akvokonservejo estos pejzaĝejo kun multaj ripozhejmoj kaj sanatorioj por la laboranta popolo de Ĉinio. En la ombraj kavoj junaj pioniroj starigos siajn somer-libertempajn tendojn.

Güanting-akvokonservejo tiam plenumos siajn multflankajn celojn: inund-jungado, akvokonservado por irigacio kaj navigacio, produktado de elektra energio kaj provizado de trink-akvo al la urboj.

Tuj malsupre de la digo stariĝos elektrejo, kiu, kune kun aliaj pli malsupre, produktos sufiĉe da elektro por plenumi la postulojn de pli granda Pekino por luma kaj povo.

La akvo kiu antaŭe inundis la landon aŭ fluis senutile en la maron estos konservita kaj reguligita por akvumi parton de la tero proksime al Pekino, kaj el tio rezultos pliprodukto agrikultura. La minacoj de inundo kaj de sekeco neniĝos por eterne. Ĉiujare estos ŝparitaj 20,000 milionoj da juanoj sole por konservado de digoj.

Parton de la akvo oni defluigos por provizi la pli kaj pli kreskantan loĝantaron de Pekino per trinkakvo kaj por industria uzo en ĝiaj ĉirkaŭurboj. Per alia parto da akvo oni faras la riveron navigebla tutjare.

Tio estas la signifo de ĉi tiu granda paca konstruo de la ĉina popolo—la subjugado de la antaŭe demona Jungding-rivero.

Nova Ĉinghŭa-universitato

Transformiĝo de Unu el la Plej Malnovaj Universitatoj de Ĉinio

Jaŭ Fang-ĵing

Okcidente de la Pekina urbomuro, je la distanco de 20 minutoj per aŭto, sin trovas parko kun densaj arbaroj kaj bela rivereto fluanta inter junkokovritaj bordoj. Tio estas la sidejo de Ĉinghŭa-universitato, unu el la plej malnovaj ĉinaj universitatoj. Profunde en la fono, vidiĝas kelkaj konstruejoj. Novaj lernoĉambroj, dormoĉambroj, laboratorioj kaj eksperimentaj fabrikoj estas leviĝantaj. La nova konstruo—kvante atinginta 46 procentojn de la originala plankspaco de Ĉinghŭa—estas tipaĵo de la tuta transformiĝo de la universitato. Granda ŝanĝo okazis al ĝi. La klasdevenoj de la studentoj, la organizo de la fakultatoj kaj kursoj, la principoj de instruado kaj studo, ĉiutaga vivo en la universitato—ĉio transformiĝis.

En akordo kun la eduka politiko de nova Ĉinio, Ĉinghŭa fariĝis politeknika instituto. Ĝia tasko estas provizi kvalifitajn inĝenierojn bezonatajn por la fundamenta konstruado.

Ĉinghŭa fondiĝis en 1911. En sia konsiderinde bela sidloko—ĝia nomo signifas: "pitoreska pejzaĝo"—ĝi fariĝis speco de *Shangri-la* kie kleruloj klopodis sin fortiri de la malagrablaj realaĵoj de la vivo en antaŭliberiga Ĉinio. Kiel en aliaj universitatoj, ĝiaj oficialaj vivo kaj penso estis tute ekster kontakto kun la realaj bezonoj de Ĉinio. Kursoj en la artoj kaj sciencoj estis bazitaj sur la modelo de kapitalistaj eduk-sistemoj. Ili ne havas rilaton kun la bezono de la popolo aŭ eĉ kun tiu de la mil kelkcent studentoj. Progresaj agadoj en la universitato estis forte subpremataj.

Estas tiu ĉi rilato inter universitato kaj vivo kiu ŝanĝiĝis tiel komplete. Nova unuiĝo stariĝis inter la instruistaro kaj la studentoj, inter ili kaj la ĉina popolo, inter iliaj studoj kaj la bezonoj de la popolo. Ĝi baziĝas sur komuna strebado por konstrui liberan, produktivan, prosperan kaj feliĉan landon.

Universitatoj Reorganizitaj

La novaj ideoj trablovigis Ĉinghŭa-universitaton kiel "freŝa zefiro". En julio, 1952, ĉiuj altaj edukaj institucioj en Ĉinio estis reorganizitaj aŭ regroupigitaj por plenumi la novajn taskojn kiujn la lando alfrontas. Ĉinghŭa ricevis la taskon de politeknika edukado. Profitante el la spertoj de teknikaj kolegioj en Sovetunio, ambaŭ strukturo de diversaj fakultatoj kaj instruaj metodoj estis radikale ŝanĝitaj.

Por plenumi la nunajn kaj estontajn bezonojn de la diversaj branĉoj de industrio servanta al la popolo, Ĉinghŭa establis ok fakultatojn kun 22 kursoj por trejni inĝenierojn kaj 15 specialaj dujaraj kursoj por trejni kvalifitajn teknikistojn en maŝinfabrikado, konstruado de elektrejoj, hidrolika, elektra, radia, petrola inĝenierado, civila inĝenierado kaj arkitekturo.

Kelkaj el tiuj ĉi kursoj kiel maŝinfabrikado kaj petrola inĝenierado enkondukis tute novan elementon en la lernoprogramon de Ĉinghŭa. En la malnova inĝeniera fako ne estis tiaj kursoj nur pro tio, ke la reakcia reganta klaso de Ĉinio ne volis aŭ ne povis disvolvi ĉinan propran maŝinfabrikon aŭ petrolan industrion. Maŝinoj kaj oleo estis ĉiam aĉetitaj el kapitalistaj landoj kiel Britio aŭ Usono, kiuj siaflanke ja ne deziris ke Ĉinio sendependiĝu en industrio....

Sed hodiaŭ la grandskala konstruado komencita sub la Popola Registaro por la industriigo de la lando jam levis urĝan bezonon de trejnita teknikistaro. Ĉinghŭa estas unu el la edukaj institucioj planitaj por plenumi tiun ĉi bezonon kiel eble plej rapide.

La bona interligo de teorio kaj praktiko estas ĉefa principo de instruado en la nova Ĉinghŭa kiel ĝi estas tra la tuta eduka sistemo de nova Ĉinio. Sub la malnova akademia sistemo, diplomitoj de la inĝeniera kolegio eniris tute fremdan mondon kiam ili komencis labori en industriaj entreprenoj. Nun ili akiras praktikan sperton kune kun teoria scio sub sistemo en kiu ĉiu fakultato planas sian laboron kun tute klara praktika celo kaj inkluzivas tri periodojn de efektiva laboro en fabrikoj dum la kvinjara lernado. En la unua periodo, studentoj akiras ĝeneralan scion pri laboro en efektiva produktado; dum la dua periodo ili faras efektivan laboron kiel teknikistoj kaj en la tria, dum la lasta semestro antaŭ diplomiĝo, ili estas petataj solvi konkretajn inĝenierajn problemojn. Tia trejnado produktas subinĝenierojn kaj aliajn tipojn de teknikistoj kiuj estas tute spertaj en praktika produktado eĉ antaŭ sia diplomiĝo.

Ĉirkaŭ 2,000 studentoj jam diplomiĝis el Ĉinghŭa en la pasintaj tri jaroj post liberigo. Tio estas 70 procentoj de la tuta nombro de la studentoj diplomitaj en la universitato en la 14 jaroj antaŭ liberigo. La nombro de studentoj en 1952 estis 3,800 aŭ 50 procentojn pli multe ol la plej granda cifero en la antaŭliberiga

tempo. Sed eĉ tiel, la nombro de diplomitoj ankoraŭ restas tre malgranda por la bezono.

Kolektiva Instruado

La nova lernoprogramo faris novajn postulojn al la instrua personaro, kiujn povas plenumi nur kolektiva kaj bone projektita strebado. En la somero de 1952, la pli ol 300 profesoroj kaj asistantoj en Ĉinghŭa ĉiuj partoprenis la movadon por la kompleta reformo de instruaj metodoj. Nun ĉiu klaso estas ne plu en respondeco de unu persono, sed de tuta teamo. Tio ĉi estas adopto de la Sovetia metodo de "instruaj kaj esploraj grupoj". Tridek naŭ tiaj grupoj jam formiĝis. Antaŭ ol nova kurso komenciĝas, la membroj de la grupo kunvenas kaj ellaboras programon, klarigas la ĉefan temon de la klaso, diskutas pri la plej simpla kaj efika maniero por prezenti komplikajn punktojn kaj starigas prov-klasojn se estas necese.

La nova metodo montriĝis multe super la malnova. Asistantoj de la instruaj grupoj povas pli efike helpi la studentojn en iliaj klas-laboroj. Kaj ĝi ankaŭ certigas ke junaj instruantoj profitu bonan gvidon de la pli spertaj instruistoj.

Novaj Studentoj, Novaj Celoj

La celoj de Ĉinghŭa estas videblaj en ĝia nova studentaro, en la vivo de la universitato. Antaŭ kiam la novaj dormejoj estis finkonstruitaj, la malnovaj ĉajnis kadukiĝintaj, sed en la nunaj superabundo en la vivo kaj kamaradeco, tiaj portempaj nekomfortaĵoj ja ne multe ĝenas iun ajn. La *Shangri-la*-atmosfero jam malaperis. Ĉiu estas plena de spirito explorema kaj farema. Tie ĉi sin trovas ankaŭ prepara lernejo fondita en 1951 kun 500 laborist- kaj terkulturist-lernantoj venintaj rekte el la kampoj kaj de fabrikaj stabloj sinpreparantaj por universitata edukado.

Tre malmultaj geknaboj el la laborista klaso povis eniri tian universitaton kiel Ĉinghŭa en la malnova



Studentoj de civila inĝenierado en praktika ekzercado

tempo. Nun universitata eduko ne prezentas financajn obstaklojn. La Popola Registaro pagas por manĝo kaj loĝado, por instrua kaj medicina elspezoj. Studentoj eĉ povas akiri elspezan monon kiam ili bezonas.

Ĝung Feng-o estas nur unu el la novaj studentoj al kiuj tiu ĉi politiko ebligis eniri Ĉinghŭa-universitaton. Nun ŝi ne nur studas en ĝi senpage sed eĉ ŝia dutaga veturado de Ĉangŝa en Centra-suda Ĉinio norden al Pekino estis pagita de la Popola Registaro.

Estas tute ne mirinde, ke ĝuante tian prizorgon pri ilia bonstato, tiuj ĉi studentoj eĉ Ĉinghŭa, kiel la 200,000 aliaj universitataj studentoj de Ĉinio, havas novan perspektivon en siaj lernado kaj vivo. Ili scias, ke granda tasko ilin atendas; ili perceptas ke ilia kvinjara lernado eĉ Ĉinghŭa estas kaj povas esti nur preparo por plej bone utiligi siajn talentojn en la servado al la popolo, por ke ili perfekte ludu sian rolon en la inspira laboro de landkonstruado kiu nun progresas tra la tuta lando. Tio ĉi estas granda inspiro por bone studi. Jen estas la kaŝzo por tutkora ĝuo de ĉiu vivmomento, por fari ĉion farendan tutenergie kaj sindone.

Tio ĉi estas la bazo de nova kamaradeco. Tio ĉi donas novan guston al universitataj agadoj. La studentoj havas sian propran studentan konsilon por reprezenti iliajn interesojn kaj organizi iliajn sociajn agadojn. Ĝiaj membroj estas elektitaj ĉiusemestre kaj ili zorgas pri la diversaj komitatoj gvidantaj sportajn kaj kulturajn agadojn kiel la futbala kaj volejbala teamoj, la orkestro, ĥoro, literatura kaj arta societoj kaj sciencaj grupoj. La konsilo ĝuas plenan subtenon de la universitata administracio.


Lecionoj komenciĝas je la 7-a a.t.m. kaj ĉiu leciono daŭras 90 minutojn. Post la tria, la studentoj plenigas la gimnaziajn placojn, bibliotekon kaj klubojn. Estontaj inĝenieroj formetas siajn glitmezurilojn kaj ekludas siajn muzikilojn, aŭ lernas paŝmanierojn de novaj dancoj. La Somera Palaco kun sia bela lago estas proksima ĉarma loko, precipe por kvietaj eksterdoma legado, promenado aŭ boatremado. La lerneja aŭditorio aranĝadas regulajn prezentojn de filmoj, koncertojn per la plej bonaj Pekinaj trupoj kaj prezentadon de eksterlandaj artistaj grupoj vizitantaj Ĉinion.

Eble la plej bona rimarko pri la nova Ĉinghŭa estas farita de studento kiu nur kelkajn monatojn antaŭe estis laboristo eĉ la stablo: "Nun mi lernos la desegnadon de maŝinoj. Antaŭ ne longe mi laboris eĉ ili. Mi scias kio okazos se la desegnisto faras eraron de frakcio kaj miskalkulon pri sekureco aŭ produkto. Kaj mi scias kiel multe da tiaj novaj maŝinoj ni bezonas en niaj fabrikoj. Tion sciante, ĉu mi povus fuŝlerni unu lecionon?"

Ĝu Ŝi-lun, gvidanto de la delegitaro de la Ĉina Packomitato transdonas leterojn kaj donacojn al la reprezentanto de la repatriigitaj volontuloj.



Sur herbejo en la hospitalo




Repatriigitaj Malsanaj kaj Vunditaj Volontuloj

En sia patrio la repatriigitaj malsanaj kaj vunditaj ĉinaj volontuloj estas varme bonvenigataj kaj bone prizorgataj kaj komenciĝas ĉe ili esperplena vivo.



Florbedo kun desegnoj de la ĉina, Sovetia kaj korea naciflagoj estas konstruata de la repatriigitaj volontuloj en la hospitalo. Jen manifesto de ilia patriotismo kaj internaciismo.



Bona medicina prizorgo estas donata al la vunditaj kaj malsanaj volontuloj en la hospitalo.



EN HOD


V

Ĉina grenprodukt
liberigo, egalis n
plej alta kvanto
procentojn super
grandan sukceson
problemo. Jen es
la ho

Membroj de iu agrikul-
tura produkta kooperativo



Trijaraj riĉaj rikoltoj donis ampleksan stokon al tiaj
lokaj grenejoj.



Kooperativaj terkulturi
Ŝansi-provinco inspektas s
kampojn de selektitaj

Pligrandaj rikoltoj
subtenas la foiron ĉe
Bajtutan en Liling-
gubernio, Hunan-
provinco.

Aŭskultado de novaj fono
diskoj ĉe iu interhelpa
zorga grupo en Hopej-prov



o kiu, je la antaŭvespero de la 75 procentojn de la antaŭmilita (1936), plimultiĝis en 1952 ĝis 9 tiu produktokvanto, alportante en solvo de sia manĝproviza taskas kelkaj scenoj pri la vivo en la diaŭa ĉina kamparo.



Akvokonserva laboro multe progresas ankaŭ dank' al lokaj klopodoj. Tiu ĉi pumpa stacio en Danjang-gubernio, Kiangsu-provinco, irigacias 8,500 hektarojn da tero.

Modernaj kombajnoj el Sovetio kiel t
 ĉi ĉe la ŝtata farmo Ĝjiheng, Hope
 provinco, montras la vojon al mekanikig

Antaŭe ĉifonvestitaj kamparanoj elektas belan ŝtofon en tipa vilaĝa kooperativo en Hunan-provinco.



Rapide Progresas la Konstruado de Gǔanting - Akvokonservejo



La konstruigo de tiu ĉi giganta akvokonservejo ne nur neniigos terurajn inundplagojn de Jungding-rivero, sed ankaŭ ebligos utiligi la akvon de tiu rivero por irigacio, elektroproduktado, akvoprovizo por industrio kaj trinkado kaj plibonigo de klimato.

re: Sovetia specialisto A. M. Ŝabajev helpas en projektado de la 45 metrojn alta digo.

stre: Solida digo en konstruado

e maldekstre: La argilo bezonata por la konstruado de la granda digo esta senĉese alportata.

e dekstre: La elfluejo de la 495 metrojn longa tunelo de Gǔanting-akvokonservejo



Fotografajo antaŭ Ses Jaroj

Gang Ĝu-ĵau

Kiam mi ordigis mian malnovan librokeston mi trovis fotografajn kiun mi faris ĉe la Ĉielponto antaŭ ses jaroj—en 1947, kiam mi lernis en Pekino.

En la bildo estas kvin almozetantoj—maljunulino kun unu knabo kaj tri knabinoj, ĉiuj ĉifone vestitaj. Miaj kolegoj, vidinte la bildon, interesiĝis pri la sorto de la kvin mizeruloj. Ĉu ili ankoraŭ vivas? Se ili ankoraŭ vivas en la mondo, kia estas ilia vivo? Kaj ni decidis ke ni portu la bildon kaj ilin serĉu ĉe la Ĉielponto, kiam ni estos liberaj.

La Ĉielponto estis amuza centro por la laboranta popolo antaŭ la liberigo, kie amasiĝis ankaŭ almozetantoj. La lokon ni traserĉis kelkajn fojojn sen rezulto. La tieaj loĝantoj diris ke post la liberigo, malaperis la almozetantoj kaj oni apenaŭ povas ilin trovi. Tamen ni fine trovis homon kiu iam prezentis luktarton ĉe la Ĉielponto kaj kiu konas la patrinon kaj la filinon sur la maldekstra flanko de la bildo. Li scias ke ilia familinomo estas "Li" kaj ke ili nun loĝas sub la granda ginko ie en la suda antaŭurbo de Pekino.

Onklino Li kaj Ŝia Filino

Laŭ lia montro ni eliris el la urbopordego, kaj antaŭen iris laŭlonge de la sudbordo de la rivereto ĉirkaŭanta la urbomuregon. Post nelonge oni povis vidi la altan kaj grandan ginkon starantan en distanco de kvarono da kilometro. Tie la loko aspektas tute kiel kamparo. Staras nur malmulte da domoj. Kaj la hejmo de Onklino Li estis tre facile trovita. Malaltaj teraj muroj ĉirkaŭas malgrandan korton. Du ĉambroj troviĝas norde. Brilas larĝaj puraj vitraj fenestroj. Post nia frapado, eliris maljunulino. Ŝi estas en nova blua supervesto kaj nigra vatita pantalono. Ŝia fizionomio ĝuste similas al la maljunulino en la bildo. Post demando, ni estis certigitaj ke ŝi estas vere Onklino Li. Post kiam ni klarigis la celon de nia vizito, ŝi afable nin akceptis en sian hejmon kun rideto.

Ni montris al ŝi la bildon. Ĝin rigardante ŝi ne povis sin deteni de larmado. Kaj ŝi diris kun ĉagreno miksitaj kun ĝojo: "Jen mia Kvarĉjo! Ĉu tiu ne estas mi! Vere estas dankinde ke vi konservas la fotografajn de nia pasinta mizera tempo." La knabino kiu estis manĝanta vermiĉelon sur la kang-o (hejtata lito) demetis la manĝaĵon kaj sin alŝovis por rigardi. Onklino Li ŝin puŝis al ni kaj diris: "Rigardu! Kiom ŝi kreskis! Tiu ĉi knabino vere suferis multe kun mi!" La dekdujara bela knabino ridetis honteme klinante sian kapeton flanken. Sur ŝia ronda maldekstra vango aperis pli rimarkebla ridkaveto ol tiu sur la bildo. Ni demandis al ŝi ĉu ŝi lernas en lernejo. Ŝi respondis ke ŝi lernas en la duajara klaso. Plie ŝi sciigis al ni ke la lernejo, kiu estas proksime, havas entute pli ol tricent lernantojn, kaj ke la domo kaj la mebloj ĉiuj estas novaj.

Trinkante teon ni babildis.

Onklino Li estas nun kvindekjara. Kiam ŝi edziniĝis, ŝia edzo havis nur malpli ol dek arojn da

tero. Ŝia edzo kaj ilia plejaĝa nevo laboris en la urbo. La familio apenaŭ povis sin vivteni. Poste, la situacio malboniĝis tagon post tago. Dum la japanaj invadantoj okupis Pekinon, ŝia filo mortis, kaj ŝia edzo paraliziĝis. La tuta rikoltaĵo el la peceto da tero estis baldaŭ konsumita. Ili devis ankoraŭ trovi vivrimedojn el la tero. En Pekino oni uzas kiel hejtajn karbobulojn faritajn el karbopulvoro miksitaj kun argilo. La frato de ŝia edzo kaj la nevo fosis tian teron el la kampo por vendi. Sed la cent-familiestro kruele ilin ekspluatigis kaj fakte ili povis ricevi nur duonon de la pago. Rimarkinte ke ili ne povis plu vivi tiamaniere la bofrato kaj la nevo migris al alia loko por perlabori sian panon. Restante kun la paraliziĝinta edzo kaj la tre juna filineto Onklino Li povis pasigi la tagojn nur per almozetado.

En tiuj jaroj, ĉu vintre aŭ somere, malgraŭ pluvo kaj neĝo, Onklino Li ĉiutage iris al la urbo kun sia infano frumatene kaj revenis hejmen en krepusko. Ĉiutage la familio manĝis petgajnitan maizpanon kuiritan sen salo kaj oleo kun brasikaj foliaĉoj kiujn ŝi kolektis de sur la stratoj. Unu jaron antaŭ la liberigo mortis ŝia paraliziĝinta edzo. Priparolante sian edzon ŝi larmis emociite: "Se li vivus nur du pluajn jarojn, li ankaŭ vidus la belan vivon post la liberigo."



Antaŭ ses jaroj



Onklino Li kaj ŝia filino en 1953

Jes, en la domo de Onklino Li oni jam ne povas trovi ion kio montras la pasintan malriĉecon. Apud la fenestro estas granda kang-o sur kiu alte kuŝas falditaj litkovriloj. Apud la muro en la kontraŭa flanko staras longa tablo. Ĉe la murangulo estas du ruĝaj kofroj. Meze en la ĉambro hejtata forno arde flamas. Sur la longa tablo estas bonkvalitaj porcelanaj tekruĉo kaj tasoj kiuj estas videble nove aĉetitaj. Krom tiuj estas ankoraŭ granda porcelana poto, varmizola botelo, horloĝo kun vitrokovrilo ktp.

Kiam ni demandis ŝin pri ilia nuna ekonomia situacio, Onklino Li diris kun sentimento: "Kiel ni povus pace vivi hodiaŭ sen timo pri manĝaĵo kaj vestaĵo, se ne venus la Kompartio!" Nun ŝiaj bofrato kaj nevo jam revenis post la liberigo. Pro la rekomendo de la vilaĝa registaro, ŝia nevo nun laboras ĉe iu grenejo ricevante bonan salajron. La bofrato restas hejme por teron kulturi. Kaj ŝi mem bredas porkojn kaj kokojn por akiri monon per kiu ŝi aĉetis iom-post-iome vestaĵojn kaj diversajn objektojn.

Dum la babilado kun Onklino Li ni trovis ke ŝi sentas ĝojon kaj kontenton ne nur pro la pliboniĝo de viv-kondiĉoj, sed precipe pro tio ke ŝi jam adiaŭis por ĉiam la malsaton kaj malriĉecon, kaj ke ŝi neniam plu estos premata sub la piedoj de aliuloj.

Paro da Ĝemelaj Fratinoj

Ni estis informitaj de Onklino Li ke la tria knabino de maldekstre sur la bildo estas nomata Baŭnjo kaj la kvina Cajnjo, ili estas paro da ĝemelaj fratinoj, ilia familinomo estas ankaŭ Li, kaj ili loĝas proksime de la Ĉielponto. Sekve ni facile trovis ilian hejmon.

Estas la patrino kiu la unua ekvidis la bildon. Per ekrigardo ŝi rekonis la du filinojn. Ŝi diris: "Tio estis la plej mizera jaro por nia familio. En tiu jaro, ilia patro kuŝis malsana, kaj mi estis provizora laboristino en iu vestaĵofabrika ricevanta tre malbonan salajron. Vidinte ke multaj najbaroj fariĝis almozetantoj pro malfacila vivo, mi ankaŭ lasis Baŭnjon kaj Cajnjon almozetpeti. Tiel, ni daŭrigis nian kompatindan vivon per mizera nutraĵo kaj akvo."

Baŭnjo kaj Cajnjo estas jam 18-jaraj. La du ĝemelaj fratinoj estas bone vestitaj: ili portas katunajn vatitajn supervestojn kaj bluajn vatitajn pantalonojn, kaj krome vatitajn surtutojn kun velur-kolumoj kiam ili eliras el la hejmo. Baŭnjo, la malpli alta, estas la pli aĝa fratino. Versajne ŝi pli ŝatas tualeti ol sia



Baŭnjo kaj Cajnjo en 1953

fratino. Estas videble ke ŝia hararo estas frizita. Ili ne rekonis sin en la bildo. Baŭnjo diris kun rigardo fiksita sur la bildo: "Panjo, ĉu tiu estas Cajnjo?" Ŝia patrino respondis: "Jes ja! Mi konas la pantalonon kiun mi faris el ĉifonoj kolektitaj de sur la stratoj."

Jen estas la simpla historio de tiu ĉi familio: Ekde la aĝo de dek sep jaroj la patro de Baŭnjo laboris en iu tapiŝo-fabrika tridek jarojn. Pro daŭra nokt-laboro liaj okuloj malsaniĝis pro la forta lampumo. Kiam la japanaj invadantoj okupis Pekinon, liaj okuloj duone blindiĝis. Pro tio li estis maldungita, ricevante neniom da kompensaĵo. Post tio li ofte malsanis. Kelktempe li kolportis arakidon sur la stratoj. Tamen li ne ĉiam povis profiti el tio. La patrino laboris en vestaĵo-fabrika kiel provizora laboristino. La salajro por unu-taga laboro ne sufiĉis por unu malkara manĝo por la familio. Vole-ne-vole Baŭnjo kaj Cajnjo devis eliri por peti almozon. Kiam la patrino hejmenvenis laca kaj vidis la ĝemantan patron sur la lito kaj siajn infanojn batvunditajn de la policianoj de la reakcia registaro kaj la friponoj dum almozado sur strato, ŝi ne povis deteni siajn ŝprucantajn larmojn. "Ĉu ni ankoraŭ povus daŭre

vivi?" estis la demando en ŝia koro kaj samtempe en la koroj de miloj da malriĉuloj.

La liberigo savis tiun ĉi familion el infero. La patro demandis la Distriktan Popolan Registaron ĉu li povas reakiri laboron en la tapiŝo-fabriko. La Distrikta Popola Registaro decidis ke antaŭ ĉio lia malsano estu kuracita, kuracigis lin senpage. Liaj okuloj resaniĝis post operacio, sed li ne povis fari plu laboron penigan por la okuloj. La Distrikta Popola Registaro lin rekomendis al iu konstruejo kaj li laboras tie kiel li asertis: "Mi manĝas kaj loĝas tre bone, kaj laboras tre ĝoje." Samtempe la vestaĵo-fabriko havas pli multe da laboro, sekve ankaŭ la ĉemelaj fratinoj eklaboris en la fabriko. La salajro plialtiĝas jaron post jaro. La enspezo pli ol dekobliĝis kompare kun tiu antaŭ la liberigo. La patrino de Baŭnjo diris: "Mi eĉ ne songis ke ni povas ricevi salajron tiel altan." En novembro lastjara la fratinoj estis senditaj en klerigan kurson. Dum ilia lernado trimonata, la registaro donis al ili subvencion. Diplomite, la kursanoj estas ĝenerale asignitaj al

produktaj postenoj, kaj iuj el la junaj virinoj fariĝas vartistinoj.

La du fratinoj estis tre ĝojaj preparolante sian lernadon. Ili lernas ideografojn per la "Rapida Metodo." Post unu monato kaj duono ili jam konis pli ol du mil ideografojn kaj ili kapablas legi popularajn ĵurnalojn sen malfacilo.

Floras Ĉie Libero kaj Feliĉo

La alia almozetanto sur la bildo estas knabo. Iu loĝanto ĉe la Ĉielponto sciigis al ni ke li nun estas metiisto kiu fabrikas pinĉilojn. La patrino de Baŭnjo ankaŭ diris ke ŝajne ŝi foje lin renkontis sur strato. —li estas altastatura kaj en nova vatita surtuto. Tamen pro multjara neintervido ŝi ne estis certa ĉu tio estis li kaj ŝi ne alparolis lin pro manko de tempo.

Ni ne havis tempon por daŭre lin serĉi. Sed ni kredas ke li certe vivas ĝoje kiel Onklino Li kaj la patrino de Baŭnjo, ĉar en nova Ĉinio ĉie floras libero kaj feliĉo.

Moderna Ĉina Lignogravuro

Uang Ĉi*

Ĉina ksilografio havas historion de multaj jarcentoj, sed ĝia moderna periodo kun aktualaĵoj kiel siaj temoj inkluzivas nur iom pli ol dudek jarojn.

Ekde la frua parto de la 4a jardeko de la nuna jarcento, la tuta historio de la grandioza luktado de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo kaj por la akiro de nacia sendependeco kaj demokrata libereco respeguliĝis en la arto de ksilografio. Ksilografio ludis pli aktivan rolon ol la aliaj reprezentaj artoj en edukado kaj inspirado al la popolo dum la ok jaroj de Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la tri jaroj de Liberiga Milito.

La nova ksilografio ŝuldas multe al Lu Sin, la plej granda moderna verkisto kaj granda instruisto de la arto de ksilografio. Lu Sin patronis la modernan ksilografion tiel frue kiel 1931, kiam japana imperiismo invadis la Nordorienton. Li alvokis al la junaj patriotaj artistoj uzi la ksilografion kiel sian armilon en la naci-liberiga movado.

Jen estas artoformo kies karaktero mem estas demokrata, malmultekosta por praktikado — bezonanta nur lignoblokojn, tranĉilojn kaj gravurilojn — multobligebla, kaj kun riĉaj profiteblaj spertoj ambaŭ en Ĉinio kaj en eksterlando. La Lekcia kaj Pristuda Rondo de Ksilografio kiun li fondis en Ŝanhajo tiutempe estis la plej frua organizo de ksilografistoj en Ĉinio.

Tiam estis tre grave laŭ eble plej vaste konigi al la junaj artistoj la diversajn teknikojn de la tiutempa lignogravuro kaj tiel plimultiĝi iliajn rimedojn por esprimado. Lu Sin rekomendis al ili precipe la verkojn de la Sovetiaj lignogravuristoj kaj de la mortinta Kaethe Kollwitz, la fama germana artistino. La ksilografaĵoj de Kollwitz donis grandan influon al la juna renaskita arto en Ĉinio.

En la tagoj de la furioza Kuomintang-a blanka teroro, kiam artistoj estis vive enterigataj kaj mortpafataj pro siaj revoluciaj protestoj en artverkoj, estis ja malfacile vidi la vojon al realista revolucia optimismo. La morto de Lu Sin en 1936 estis la perdo de brila instruisto de arto. Sed li konstruis firman fundamenton por la vojo de revolucia realismo laŭ kiu la ĉinaj lignogravuristoj ĉiam antaŭen marŝis.

En la Rezistmilito

La premado de la popolo fine devigis Kuomintangon partopreni la Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj la Kontraŭjapanan Unuecfronton kun la Ĉina Komunista Partio. Artistoj akiris pli grandan liberecon en agado. La milito mem estis granda lernejo en kiu la arto de la ĉina ksilografio estis forĝita. Multaj el la lignogravuristoj partoprenis la edukadon inter la defendaj fortoj. Ksilografaj presaĵoj iris en la fosaĵojn ĉe la fronto, dum en la postfronto ili aperis en ekspoziciejoj en la urboj aŭ en la vilaĝoj en la formo de afiŝoj. Ili alvokis al la popolo, inspirante ilin lukti kontraŭ la invadantoj.

Sufiĉe granda nombro da intelektuloj kaj miloj da junuloj dume iris al la fama Ŝensi-Kansu-Ningŝia-a Limregiono, kiu estis la centro de nacidefendo, kaj tie en 1938, sub la gvido de la Komunista Partio, fondiĝis la Lusin-a Arta Akademio en Jen'an. La granda tradicio de Lu Sin donis novan impulson. Multaj gvidantaj ksilografistoj kiel Li Ĉjun, Ma Da, Hu Jiĉuan kaj Ĉjang Feng instruis ĉe la Akademio. Gu Jŭan kaj Jen Han estas du el iliaj elstaraj lernantoj.

La Lusin-a Arta Akademio la unua montris ekzemplon de interligo de teorio kun praktiko en instruado



Tajdo de Kolerego

Li Hŭa

Jen estas ekzemplo klare montranta la influon de Kaethe Kollwitz sur la ĉina ksilografio dum la periodo 1931-36.

de belartoj en Ĉinio. Atinginte certan lernostadion, la junaj artistoj tuj estis dissenditaj por fari propagandon en la armiaj fortoj aŭ en la vilaĝoj. En 1939, la Ksilografa Grupo, partoprenita de Jen Han, Lo Gung-liŭ, Hŭa Ŝan kaj aliaj kaj gvidita de Hu Ji-ĉuan, laboradis en la gerilaj areoj en la malamika postfronto. La Nordĉinia eldono de la tagĵurnalo Sinhŭa regule aperigis aldonaĵon titolitan "Ksilografajoj el la Malamika Postfronto" tute dediĉitan al lignogravuraĵoj pri la heroajoj de la Oka-voja Armeo kaj kruelaĵoj de la japanaj invadantoj. Tiuj ksilografajoj ludis grandan rolon en edukado de la popolo en la postfronto kaj mobilizado de subteno por la fronto.

Lecionoj pri Sovetia Arto

Dum la Dua Mondmilito, ĉinaj ksilografajoj ekspoziciĝis kvarfoje en Sovetio kaj po dufoje en Britio, Usono kaj Hindio kaj foje en Francio. Miloj da facetoj de la ĉina batalo por libero estis montrataj. Ili forĝis novajn amikajn interligojn inter la popoloj.

La ĉinaj lignogravuristoj estis ege influitaj, ellernis multajn gravajn lecionojn de la Sovetiaj lignogravuraj artistoj—precipe la aplikon de marksista koncepto kiu inspiras la artiston per fido al la neevitebla venko de la revolucio—revolucia optimismo, kompreno pri socialisma realismo. Sovetiaj ksilografajoj montris al ili novajn horizontojn.

La ĉinaj ksilografistoj ekaplikis kun nova energio la lernitajn lecionojn por ankoraŭ pli firme interligi sian laboron kun la revolucia luktado de la ĉina popolo kaj iliaj naciaj kulturaj tradicioj. La ksilografaj artistoj plejparte devenintaj el la etburga intelektularo, estis en certa grado fremdaj al la ideologio kaj sentimento de la laboranta popolo en la urbo kaj kamparo. Nur iom post iom ili alproksimiĝis al la problemoj de plena apliko de la artista metodo de socialisma realismo.

En la unua stadio de la japana invado la Nordorienta Ĉinio en 1931 ĝis la antaŭvespero de la Kontraŭjapana Rezistmilito, modernaj ksilografajoj ĉefe prezentis la mizeron de la ĉina popolo sub la regado de la Kuomintanga reakciularo kaj imperiistoj. Tiam la ksilografistoj ankoraŭ ne bone interligiĝis kun la granda revolucia movado de la popolamasoj kaj ne konsciis pri ĝia granda forto. La tiamaj verkoj respegulis la tragikajn malesperajn luktojn, la suferajn kriojn de la popolo kaj la senton de izoleco kaj hezitemo kaj la ekfulmojn de brulanta indigno kaj ribeleco de la malforta ĉina etburgaro. En formo, ili tro multe emfazis la uzadon de malhela ombro. Iliaj figuroj preskaŭ perdiĝis en mallumo. En la ksilografajoj de tiu periodo troviĝis tre malmulte da optimismo kaj la nacia tradicio de ĉina arto.

Granda ekspozicio pri Sovetiaj grafika arto estis oportune okazigita en Ŝanhajo en 1936. La studo pri Sovetia socialismo-realisma arto ebligis al la artistoj je la komenco de la Rezistmilito ne nur prezenti la kruelaĵojn de la malamiko sed ankaŭ prikanti la heroajn batalantojn de la popolanoj de ĉiuj socitavoloj kiuj partoprenis la luktheadon, kaj ankaŭ trakti aliajn pozitivajn kaj stimulaĵajn temojn. Tamen, ili estis ankoraŭ sub forta influo de fremdlandaj formoj. Tre malmultaj artistoj serioze studis pri la granda kultura heredaĵo de nia lando en la grafikaj artoj. La de ili uzitaj ekscese Okcidentaj formoj ne estis laŭ la gusto de la vastaj popolamasoj; kaj sekve al ili mankis persvada tuŝo al la popolamasoj. Nur en la jaro 1941, kiam granda debato okazis inter artistoj kaj verkistoj en Ĉungking pri la demando pri naciaj artformoj, parto de ksilografaj artistoj komencis atenti pri tiu ĉi punkto. Sed ankoraŭ restis la demando kiel solvi la problemon en praktiko.

En 1942. Prezidanto Maŭ Ze-tung faris siajn famajn paroladojn pri problemoj de literaturo kaj arto en Jen'an. Li emfazis la neceson por artistoj servi al la laboristoj, terkulturistoj kaj popolaj batalantoj, mastri marksismo-leninismen kaj sin ĵeti tutkore en la revolucion luktadon. Sekvante lian konsilon, ksilografaj artistoj en la liberigitaj regionoj iris vivadi kun la amasoj de la laboristoj, terkulturistoj kaj soldatoj. Ili batalis kaj laboris kune kun ili. Tiel ili remuldis sian tutan koncepton, kaj la efiko sur la arto de ksilografio estis tuj videbla. La amplekso de iliaj temoj kaj subjekto-materialoj rapide grandiĝis. Aldone al la batalfronto, diversaj aliaj aspektoj de la popola vivo en la liberigitaj regionoj, kiujn ili nun vidis jam kiel partoprenantoj kaj ne nur kiel observantoj, aperis kiel temoj: elektoj, vintraj lernejoj, la novdemokratia familia vivo, publika higieno en la vilaĝoj, agrara reformo, ktp. La ksilografajoj *Aŭskultado al Raporto*

de Li Ĉjun, *Rentoredukto kaj Ma Ŝi-u Interpacigas en Proceso* de Gu Jūan, *Elektado per Fabograĵoj kiel Balotiloj* kaj *Kliniko* de Jen Han kaj *Konsolo al la Armeo* de Ŭang Liŭ-giŭ estis inter la plej bonaj produktaj de tiu periodo.

Utiligo de la Kultura Heredaĵo

Tiutempe, kiam nur malmultaj urboj estis en la manoj de la liberigaj fortoj, la ĉefaj rigardantoj de ksilografaĵoj estis kamparanoj. Por fari sian arton facile akceptebla al ili, la ksilografaj artistoj trovis, ke estas necese pruntepreni populajn artformojn kiel tiujn de "Pordo-dioj", novjaraj pentraĵoj, papertranĉaĵoj per tondilo aŭ tranĉilo por ornamo fenestrojn, kiuj estis popularaj inter la kamparanoj. Tiamaniere la bona

jam kreis novan kaj unikajn stilon bazitan sur la nacia tradicio interligita kun moderna realisma revolucia koncepto. Ili alproksimiĝis al plenumo de la tasko krei arton "forme nacian, enhave socialisman."

Multaj ksilografaj artistoj en la regionoj sub Kuomintanga regado organiziĝis en la Tutĉinia Asocio de Ksilografistoj en Ĉungking por apliki tiujn ĉi lecionojn al sia arto laŭ praktikebleco spite de la fakto ke ekde 1939 la Kuomintanga kontraŭrevoluciularo kaj malvenkistoj rekomencis siajn publikajn kontraŭpopolajn politikojn en Ĉungking. Tiamaniere la novaj ideoj fluantaj de Jen'an formis la ĉefan fluan de la movado en kiu la ksilografistoj dediĉis sian arton al la servado de la Kontraŭjapana Milito. Kelkaj eminentaj verkoj de Li Hŭa, Ŭang Ŝu-ji, Jen Feng, Jang Ŝi kaj aliaj tion atestas.

Je la liberigo de la ĉeftero, la ksilografistoj tra la tuta lando triumfe kunigis forton ĉe la Tutĉinia Reprezentanta Konferenco de Verkistoj kaj Artistoj en Pekino (1949) kaj formis sian Tutĉinian Asocion de Belartaj Laborantoj.

Hodiaŭ la vastaj popolamasoj aŭdigas urĝan kaj kreskantan postulon por kulturo. Artistoj nun rekomencas gravuradon en pli granda skalo kaj alproksimiĝas al la centra temo hodiaŭa—landkonstruado en ĉiuj ĝiaj sferoj. *Rekonstruado de la Anŝana Ŝtalfabrika* kaj *Pekina Laborista Kultura Palaco* de Gu Jūan, kaj la *Mastroj de Sia Lando* de Jen Han estas ekzemploj de tiuj ĉi verkoj.

La Centra Akademio de Belartoj en Pekino fondos grafikan fakon por trejni laŭplane grandan nombron da profesiaj ksilografaj artistoj kaj akvoartistoj. Ili estos preparitaj por la tempo kiam gravuraĵoj okupos gravan lokon en la kampo de ilustrado kaj dekoracio por literaturaj verkoj. La ksilografaj heredaĵoj de antikva Ĉinio ankaŭ estos sisteme selektitaj kaj pristudataj. Sendube la arto de ksilografio en Ĉinio alproksimiĝas al nova kaj riĉe kreiva periodo.

* La aŭtoro, Ŭang Ĉi, estas asistanta profesoro de grafika arto en la Centra Akademio de Belartoj en Pekino.



Armiĝu!

Sin Bo

Lignogravuraĵo de 1936 kiu montras fortan influon de Sovetia lignogravuro.

tradicia tekniko de la antikva ĉina ksilografio kaj la ĉina popola arto enkondukiĝis en la modernajn ksilografaĵojn. Natura skizo estis nun vaste praktikata. Komenciĝis pli multa uzo de linio-tekniko. Lumo, atmosfero, pli vasta perspektivo, pli bona koncepto pri formo aperis en la ksilografaĵoj. Ili montris pli da klareco, simpleco, pureco de linioj kaj atento pri detalaĵoj—karakterizaĵoj de la antikva ĉina grafika arto. La gravuristoj de Jen'an ege plibonigis sian teknikon.

La ksilografaĵoj de tiu ĉi periodo (1942-49) faritaj de Ŭang Ŝi-gŭo, Li Ĉjun, kaj la aliaj jam menciitaj artistoj montris ke la lignogravuristoj iom post iom forskuis la ekscesan influon de Okcidentaj formoj kaj



Leglernado

Artisto Nekonata

Tiu ĉi fenestra dekoracio de ĉ. 1942 montras la influon de popola papertranĉa arto sur la lignogravuro.



Balotado per fabgrajnoj

Jen Han

Kurantaj Aferoj

Britlanda Komerca Delegacio Alvenis Pekinon

Britlanda Komerca Delegacio kun 19 membroj, formita de Britlandaj industriaj kaj komercaj rondo, venis al Pekino per vagonaro la 19an de junio.

Inter tiuj kiuj bonvenigis ilin ĉe la stacidomo estis: Ĉji Ĉaŭ-ting, ĝenerala sekretario de la Ĉina Komitato por Antaŭenpuŝo de Internacia Komerco, Ĉen Han-seng, membro de la nomita komitato, kaj Lu Ŝju-ĉang, Ĉef-direktoro de la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio.

La Delegacio konsistas el S-ino Joan Robinson, Vic-prezidanto de la Britlanda Konsilantaro por la Antaŭenpuŝo de Internacia Komerco; Bernard Bucknan, Direktoro Transmara de la Londona Eksporta Korporacio; Matthew D. H. Burn, reprezentanto de la Kompanio por Tubo-investoj; kaj multaj aliaj eminentuloj de la industriaj kaj komercaj rondo en Britio.

Komerca Kontrakto kun la Franca Delegacio

Kontrakto estis subskribita en Pekino je la sesa de junio inter la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio kaj la Franca Industria kaj Komerca Delegacio estrita de B. De Plas. Tiu ĉi kontrakto estis atingita post mallonga kaj sincera intertraktado sur bazo de egaleco kaj reciproka profito.

Tiu ĉi kontrakto difinas por ambaŭ flankoj komercaĵo-interŝanĝon sumantan je 10 milionoj da funtoj sterlingaj (pagotaj per frankoj). La franca flanko vendos al la ĉina flanko ĉefe ekipaĵojn por produktado, inkluzive de ŝtaloj, maŝinoj, motor-veturiloj, preparitaj medikamentoj, kuracaj instrumentoj kaj krudmaterialoj por kemia industrio. La ĉina flanko vendos al la franca flanko teon, silkon, vegetaĵ-oleojn, porkharegojn, kolbaso-intestojn, plumojn k.a. Konkretaj kondiĉoj por la transdonado estos difinitaj en apartaj kontraktoj inter ambaŭ flankoj.

Jumen-a Ole-provizo 16-oble super la Kvanto Antaŭe Taksita

Laŭ raporto de la Administracio de Jumen-a Olekompanio (en Kansu-provinco), la utiligebla oleprovizo de tiu kampo estas dekseksoble super la antaŭe taksita kvanto.

Esploro montras ke la dimensio de la ole-kampo estas 35 procentojn pli granda ol laŭ antaŭa taksado. Nun 50 procentoj de la oleo povas esti ekstraktitaj per Sovetiaj metodoj dum per aliaj metodoj oni akiras nur 30 procentojn. Ole-tavoloj kiuj, laŭ la konjekto de Kuomintang, ne povis esti profitdone ekspluatataj, nun pruvigas valorajn. Profunda puto estas traborata por serĉi pliajn ole-tavolojn.

La Ŝtalfaristo

Ĉen Mjaŭ

I

La vetura argano finis la enforigon de mineraloj. Nur tiam Majstro Sun turnis sin por paroli kun Bejseng. La lasta korbatis tamburade pro ia nekonata kaŭzo kaj sentis tian malkomforton kvazaŭ dornoj kreskus sur lia tuta korpo. Sed Majstro Sun tiel ŝanĝiĝis, ke lia ruĝeta vizaĝo radiis kun rideto kvazaŭ li ĵus drinkus vinon kaj fiksis sian rigardon al Bejseng, dirante: "Kiel, mia junulo? Oni devas havi ŝtalan volon por lerni ŝtalfaradon. La moluloj prepare ĝin forlasu ĝustatempe! Ĉu vi elportos la penegon?" "Mi elportos!" respondis Bejseng kun brustostreĉo. Aŭdinte la decideman respondon de la junulo, Majstro Sun frapis Bejseng sur la ŝultro gajhumore, kvazaŭ li volus mezuri lian fortikecon kaj ankaŭ lin kuraĝigi, dirante: "Estas bonege, ke vi elportos."

Dume la laboristoj de la fornego amasiĝis ĉirkaŭe, kaj karesis Bejseng per bonvenigaj rigardoj kiel ion kuriozan. Majstro Sun ordonis ilin iri malantaŭ la fornegon por ordigi la skorion, kaj poste turnis sin al Bejseng: "Surmetu vian velŝtofan bluzon kaj estu preta. Faru aperturon per rastilo ĉe la fornega faŭko por ellasi la skorion." Jen la kutimo de Majstro Sun: la unua leciono por ĉiu novulo estis elmeti lin al provo ĉu li povas elteni la varmecon.

Surmetante la velŝtofan bluzon kiu estis kvazaŭ farita el ferplato, Bejseng pensis kun decidemo: "Mi nepre englutus vin eĉ se vi estus malmola ŝtalo!" Li levis la rastilon kaj, celante al la fornega faŭko, faris fortan frapon. Sed ĝi kvazaŭ falis sur risorto kaj tuj resaltis. Kolero ekflamis en lia koro, li faris du paŝojn antaŭen kaj donis alian baton al la loko, kie troviĝis fendeto. Sed same vane. Tio lin des pli provokis. Li iris tuj antaŭ la fornegon kaj faris pli fortan frapon sur la fendita loko; jen ekaperis aperturo ruĝe blanka. La blindige blanka lumo malhelpis al li malfermi la okulojn. Kvazaŭ milo da tranĉiletoj skrapis al li la nazpinton kaj la vangojn; la orbitoj sekiĝis antaŭ la brulego kaj la du okuloj elvomis fajron. Li ĵetis rigardon flanken kaj vidis, ke Majstro Sun staris tie senmove kvazaŭ li intence atendus de li ion ridindan. Li ankoraŭfoje kolektis sian energion kaj daŭrigis la frapadon. La velŝtofa bluzo estis bruliga sub la bakado. Kiam la korpo ekmovetiĝis, la haŭto kvazaŭ tuŝus ardan ferplaton. Tio estis malfacile elportebla. Li jam atentis pri nenio kaj faris alian frapon kun tuta sia forto. Jen bloko falis de la breĉo en la skoriujon sub la fornego kvazaŭ ŝtonego forruliĝanta de la monto. Tuj sekve rubando da io brile blanka fluus el la fornego. Li ĵetis la rastilon surteren, de kiu algluiĝintaj fajreroj disflugis ĉiudirekten. Sur lia korpo ŝvito fluus malsupren rive. Li sentis iom da kapturniĝo.

"Ĉu estas varmege?" demandis Majstro Sun.

Bejseng subpremis la elsaltontan koron per forto kaj respondis: "Ne!"

Majstro Sun longe ridis kaj pensis en si: "Malcedeman langon havas tiu junulo, tre bone, bravulo li

pruviĝas." Sed buŝe: "Jen estas nur la unua ŝtupo de la longega ŝtuparo, vi devas iri ĝisfine kun firmaj paŝoj!"

Post la laborvico tiutage, Bejseng forgesis la tut-tagan lacon kaj iris hejmen kun malpezaj paŝoj.

II

Tiun tagon oni okupiĝis pri riparo de la fornego. Ĉiuj laboristoj de la fornego tenis malgrandan ŝovelilon en la manoj, staris en longa vico, prenis per ĝi ŝovelilon da magnezito kaj ĵetis ĝin en la blanke brilantan faŭkon de la fornego unu post alia. Majstro Sun staris antaŭ la fornego kaj rigardis atente tra siaj nigraj okulvitroj.

Ricega Rikolto

Ŭang Ĵo-ĵuan

Trifoje kriis kokoj. Krepuskiĝas. La tam-tamoj

De l' interhelpa grupo ĉiujn el la dormo ŝiras. Kun bovo aljungiĝita kaj falĉiloj akorigitaj, Tje-so kaj Jen-hŭa ĉe l' border' vilaĝa kune iras.

Senlime etendiĝas la grenkampoj orkoloraj De l' grup' kaj formas kune vastan maron kun ondumo.

Susuras la spikar' matura sub la ventkareso; Ek- kaj ek-fulmas la falĉiloj en la suna lumo.

De frumateno ĝis tagmezo
Kaj post sies' ĝis sunsubiro
Ĉiuj falĉadas forgesante lacon.
Iu grenspikon levas kaj kalkulas:
Rizgrajnoj ducent naŭdek naŭ precize.
Ĉiu parcel' promesas nepre riĉ-donacon.

La densaj grajnoj orkoloras
Kaj peze pendas en aretoj.
La garboj dise kuŝas kaj malhelpas
Liberan iron al la hompiedoj.

La fojnamasoj altas kiel homa kresko
Kun garboj eĉ pli dikaj ol la lumb' de bovoj.
Ili altiĝas ĝis l' aksel' de Tje-so,
Altiĝas super la de Jen-hŭa brovoj.

La garboj altas, sed malaltas Jen-hŭa
Li baldaŭ trovas ŝin nenie.
"Jen-hŭa, he, Jen-hŭa, kien ja vi iras?"
"Mi falĉas. Tje-so, falĉas mi ĉi-tie!"

Bejŝeng staris en la vico, levis energie plenŝovelilon da magnezito kaj ĵetis ĝin plenforte en la fornego. Li ĵus turnis sin por foriri, kiam li ekaŭdis laŭtan krion de Majstro Sun: "Kien vi ĵetis ĝin?" Bejŝeng rigardis malantaŭen kaj rimarkis ke Majstro Sun oblikve rigardas lin de super la nigraj okulvitroj kvazaŭ pikiloj. Bejŝeng ridetis embarase kvazaŭ konfesante sian eraron. Sed Majstro Sun ne kontentiĝis per tio kaj haltigis lin per ekti-ro: "Kion utilas via rido! Rigardu per malfermitaj okuloj, kian eraron faris." Bejŝeng turnis la kapon kaj vidis, ke sur la bolanta ŝtalfluido naĝas nigraj eretoj. La plenŝovelilon da magnezito li ne ĵetis sur la malantaŭan muron sed en la ŝtalfluidon. Ĉu pro pento de la misfaro aŭ de la tro akraj vortoj de Majstro Sun, kiu vundis lian senton. Bejŝeng sentis ke io ĝena pezis sur la koro.

Kiam la fornego estis finriparita, oni diris al li, ke kelke da brikoj defalis de la fornega tegmento. Bejŝeng surmetis la lignoŝuojn, sed trovis, ke la laĉoj jam rompiĝis. Tiam li forĵetis ilin kaj kuris supren nur kun la tolaj ŝtrumpoj. La brikoj transiris supren de manoj al manoj kaj la fornega tegmento estis riparita post kelkmomenta klopodo. Bejŝeng malsupreniris spiregante pro la streĉa laborado. La velŝtofa bluzo preskaŭ tramalsekiĝis de ŝvito. Kiam li direktis sian rigardon malsupren, li ekrimarkis, ke la piedfingroj, oni ne scias kiam, gratvundiĝis kaj sango fluetis. Li nur defrotis ĝin per la mano kaj eĉ ne sentis doloron.

Post la laborvico, okazis laŭkutime grupeta kunsido. Menciante Ŭang Bejŝeng, ĉiuj laboristoj de la fornego laŭdis lian aktivecon kaj kuraĝon. Neniu el la grupanoj kontraŭdiris. Bejŝeng subpremis perforte sian ĝojon kiu ekŝvelis en la korfundo sed neniel

sukcesis kaŝi la buŝangulan ridkavon. Kiam la kamaradoj finesprimis siajn opiniojn, ĉiuj direktis la rigardon al Majstro Sun.

Majstro Sun ekparolis: "Ne, vi diris malprave."

Tiuj vortoj konfuzis la amason kaj ekbatis la koro de Bejŝeng, kiu ne komprenis kia estis la afero.

Majstro Sun ekstaris kaj daŭrigis: "Prave, Bejŝeng estas aktiva kaj kuraĝa, sed li meritas kritikon. La proverbo diras: 'Oni ne ricevas baton eĉ la kruro se ĉio estas antaŭe bone aranĝita.' Oni devas atenti pri ĉiuj bagateloj. Jen li vundis siajn piedfingrojn, ĉar li ne riparis la lignoŝuajn laĉojn ĝustatempe. Nun konsideru, ĉu li agis prave?"

Finaŭdinte, ĉiuj konsentis la opinion de Majstro Sun. Bejŝeng aŭskultis silente kun klinita kapo lian admonon, kial oni ne devas neglekti eĉ la bagatelojn.

Tiuvespere hejmveninte, kiam li estis vespermanĝinta, li forŝovis la pelveton, kuŝiĝis sur la terlito kaj meditis pri la okazintaĵoj dum la tago. "Majstro Sun ofte donas al mi predikon malafable. Ĉu li intence ĉikanas?"

Ĉuste en tiu momento, iu vokis ekstere: "Ĉu Bejŝeng estas hejme?" Li tuĵ distingis la laŭtan kaj krudan voĉon de Majstro Sun. Li ellitiĝis senprokraste. Antaŭ ol li transpasis la sojlon, Majstro Sun jam envenis. Kiam li ekvidis la bonkoran mienon de Majstro Sun, li korbatis kaj ruĝiĝis ĝis la oreldikoj, kvazaŭ Majstro Sun konus kion li ĵus pensis kaj li faris ion kulpan.

Majstro Sun sidiĝis. Bejŝeng timis, ke li parolos pri la okazaĵoj de la tago. Sed tiu nur babiladis pri ĉiutagaj bagateloj, kvazaŭ li jam ĉion forgesus.

Antaŭ ol li forlasis lian domon, Majstro Sun elprenis el la poŝo libreton dirante, ke ĝi estas libro pri metalurgio, kiun la inĝeniero donacis al li, kaj ke Bejŝeng bone studu ĝin kiam ajn troviĝas libera tempo. Ricevinte la libron li rigardis Majstron Sun kun senvorta dankemo. Li akompanis lin eksteren. Li sentis, ke li havas ion por diri al li sed li ne eldiris kaj revenis hejmen post longa kunirado.

Post la laborvico de la sekvinta tago, en la lernokunsido de la branĉo de la Novdemokratia Junula Ligo, la fabrikestro Ĝang rakontis pri iu malnova laboristo.

Kurantaj Aferoj

5,000 Kilometroj da Aŭto-vojo por Ĉi Jaro

Pli ol 5,000 kilometroj da aŭto-vojo estas konstruataj aŭ rekonstruataj de la Centra Popola Registaro en tiu ĉi jaro. Tiu ĉi inĝeniera laboro inkluzivas la konstruadon de 17,000 metroj da pontoj kaj miloj da aliaj konstruaĵoj.

En tiu ĉi jaro oni koncentrigas sian forton sur la konstruado aŭ rekonstruado de tiuj gravaj aŭto-vojokijuj formas parton de la kvin-jara ekonomia konstruado. Oni ankaŭ metas sian atenton al la trafiko en la minoritataj regionoj. La Sikang-Tibeta Aŭto-vojo, la Sining-Juŝu-a Aŭto-vojo en la nordokcidenta Ĉinghaj-provinco, du aŭto-vojokijuj en Seĉuan-provinco kaj kvar en Junnan-provinco (en Sudokcidenta Ĉinio)—ĉiuj tiuj malfacilaj inĝenieraj projektoj celas la interkomunikigon de tiuj regionoj kun la aliaj partoj de la lando kaj la antaŭenpuŝon de la politika, ekonomia kaj kultura disvolviĝo de la minoritatoj.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili estos fidele reprezentataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:


1) Sendi al ni 2 ekzemplerojn de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

2) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Por faciligi tiuf flankan kunlaboron, ni estas pretaj laŭeble helpi la kunlaborantojn per aliaj materialoj pri popola Ĉinio, se ili tion petos. Al ĉiu utiliginto de nia materialo ni sendos malgrandan donacon kiel bildkartojn, libron ktp.

Ĉiuj veraj pacamantoj nepre klopodadu por pli bona interkompreno inter la diverslandaj popoloj por ke ili efike laboru por longdaŭra paco

—La Redakcio



"La ingeniero ĝin donacis al mi," diris Majstro Sun. "Bone ĝin studu kiam ajn troviĝas libertempo."

La rakonto impresis Bejŝeng tiel profunde ke ĝi kvazaŭ gravuriĝis en lian koron kaj li ne povis ĝin forgesi irante aŭ sidante. Kiam li revenis hejmen kaj kuŝis sub la litkovrilo, li remaĉis la rakonton de la komenco ĝis la fino:

Antaŭ dudek jaroj kiam la uzino estis finkonstruita, la japanoj timis, ke la ĉinoj ellernos la arton de ŝtal-rafinado, tial ili lokis nur kelke da laboristoj ĉe la fornego de malferma fajrejo por purigi la fornegan plataĵon aŭ plenumi aliajn malgravajn taskojn. Sed estis iu celkonscia laboristo, kiu lernis kaj studis en sekreto sed ekstere li montris nenion. Fine li ellernis la tutan metion pri ŝtalrafinado.

Foje la japanoj faris vetludon per paperslipoj por vidi, kiu taksas plej precize la procenton de karbono en la ŝtalo. Iu japano diris al tiu laboristo: "Ĉu vi scipovas?" Tiu respondis: "Mi scipovas iom." La japano moke rikanis kun distortita buŝo: "Kion vi scipovas? Do skribu!" La laboristo levis la ŝtalspecimenon kaj ekzamenis atente, poste li notis ciferon sur papere. Laŭ la analizo, ĉiuj japanoj eraris, ĝuste tiu ĉina laboristo taksis plej precize.

La japanaj diablidoj ekscitiĝis. La ĉef-fornegisto sciigis la sekiestron kaj tiu raportis al la fakestro. Ili rigardis stulte unu la alian kaj grumblis kapskuante. Iu diris ke li divenis blinde kaj alia opiniis, ke li nur trafis hazarde. Sed la sekiestro diris kapskuante: "La afero ne estas tiel simpla." Tiam la ĉef-fornegisto ekmemoris ke ĉiufoje li levis la ekzamenitan ŝtalspecimenon kaj rigardis atente dum li portis ĝin al la amaso de forĵetitaj feraĵoj, kaj kiam la laboratorio finanalizis, li ĉiam aŭskultis la rezultaton kun streĉitaj oreloj. Li forŝtelis la sekreton de la metio en tiaj okazoj.... Kiam tio estis menciita, oni memoris ĉion kaj eldiris ĉiujn suspektindaĵojn. Fine la fakestro faris decidon ke li transiru al laborgrupo por porti korbegojn...

Pensante pri tio Bejŝeng ekflamis de kolero: kial malicaj estas la japanaj diablidoj! Tiam por ĉinoj eĉ la lerno de metio estis kulp! Li diris en si: "Kiel malfeliĉaj estis la tiamaj laboristoj!"

Li pensis subite: ĉu tiu laboristo vivas ankoraŭ? Kiel li statas nun? Pensante kaj repensante, li bedaŭris ke li ne pridemandis kiu estis tiu laboristo.

La sekvintan tagon, kiam oni diris al li, ke tiu laboristo estis neniu alia ol Majstro Sun, li ŝtoniĝis: "Li ja estas neniu alia ol Majstro Sun, kiu ĉiutage estas apud mi!"

Post tio, kiam li vidis Majstron Sun, li neniam satiĝis de rigardo al lia vizaĝo kun la densaj vangharoj kaj la bakitaj vangoj tiel ruĝaj kiel la granataj semoj. Sed kiam lia rigardo renkontis tiun de Majstro Sun, li tuj forturnis sian kapon kiel hontema knabino.

La sekvintan fojon kiam oni riparigis la fornegan, Majstro Sun ekrimarkis tra la nigraj okulvitroj, ke plensovelilo da magnezito en formo de bulo trafis ĝuste la kavaĵon sur la malantaŭa muro. Li turnis sian rigardon al la ĵetinto kaj trovis, ke tiu estas Bejŝeng. Li kapjesis kaj kriis laŭte: "Bravo!" Majstro Sun instruis lin kiel provi la ŝtalspecimenon. Li turnis kaj returnis ĝin en la mano kaj atente ekzamenis. Majstro Sun tre ĝojis en sekreto.

Kiam la Ĉef-administranto demandis pri Bejŝeng, Majstro Sun respondis: "Bone! Ĉion ajn li komprenis tuj post klarigo, kaj li enmemorigis ĉiun vorton kiun li aŭdis. Bravulo li estas."

(daŭrigota)

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 7

E N H A V O

Bildo sur la kovrilo—Atletinoj el Orienta Ĉinio kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio ĉe la Landa Turniro de Pilkludoj.


Kun Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Te
Reveno al la Sino de la Patrolando
La Subjugado de Jungding-rivero
Nova Ĉinghŭa-universitato
Fotografajo antaŭ Ses jaroj
Moderna Ĉina Lignogravuro
La Ŝtalfaristo
Riĉega Rikolto
Turniro de Pilkludoj

SPORTO

Turniro de Pilkludoj



Latutlanda korbopilka kaj volejbala turniro por 1953, kiu okazis de la 2-a ĝis 13-a de majo en Tienzino, allogis ĉirkaŭ 130,000 rigardantojn al sia programo de 311 ludoj. La teamoj de la Popola Liberiga Armeo gajnis la



korbopilkan kaj volejbalan trofetasojn kaj por la viraj kaj por la virinaj ludoj.

Inter la atletoj kaj rigardantoj troviĝis multaj minoritataj nacioj kaj revenintaj transmaraj ĉinoj. El la ĉirkaŭa teraso venis aklamoj en multaj lingvoj—la ĉina, ujbura, uzbekaj, korea, tartara....

Pli ol 80 procentoj de la pli ol kvarcent kvindek atletoj estis gejunuloj aĝantaj de 17 ĝis 25.

La rigardantaro elmontris precipe entuziasman aplaŭdon por la modelaj laboristoj, kamparanoj

kaj studentoj inter la ludantoj. Ili inkluzivis Ĉaŭ Ĉi, kiu estas maldekstra ariergardano de la fervoj-laborista virina korbopilka teamo, tornisto kaj kvarfoja gajninto de ruĝaj flagoj dum labor-konkurso, kaj Li Ju-ke, kiu estas dekok-jara avangardano de la Nordĉinia virina korbopilka teamo, supera-klasa studentino en la Publika Lernejo de Baŭding, kiu akiris la honoron de plej bona studento en sia klaso por ĉiu semestro deposedi sia eniro en la lernejon.

La ludoj estis karakterizataj per rapideco kaj abrupta jetado. Konsekvence, la turniro prezentis mirindajn rezultojn: la Fervoj-laboristoj superis Nordan Ĉinion per 141:100; la Popola Liberiga Armeo superis Centran Sudon per 173:89 kaj Interna-Mongolian Aŭtonoman Regionon per 182:56. Eĉ la decidiga finludo inter la PLA kaj Orienta Ĉinio atingis 136:90 kun la armeo kiel la gajninto.

